

EL POPOLO CINIO

中國報通

7 1986



VIVU LA 71-A UK EN PEKINO!



Čarma montarbaro

Foto de HE ŠIJAŮ

Enhavo

Saluto de la alta protektanto de la 71-a UK	2
Bonvenon al esperantistoj el diversaj mondpartoj	2
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Pekino — kongresurbo de la 71-a UK	4
POR LA 71-A UK: Kongresaj spektakloj plenaj de ĉinaj naciaj gustoj.	7
Vojo de Bakin, vojo de esperantisto	25
Unesko firme subtenas Esperanton	28
ESP-NOVAĴOJ	8
POR KOMENCANTOJ: Dankinda helpo	62
TANGŜAN, DEK JAROJN POST LA TERTREMO	10
Ĉu miraĝo?	10
Ili portas duoblan taskon	17
Familioj — spegulo de la urbo Tangŝan	20
Simfonio de la vivo	22
Nova Fizionomio de Tangŝan (Kolora bildoserio).	13
Dolĉakva fiŝbredado en la "millaga provinco"	43
Astronaŭtiko servas al la nacia ekonomio	46
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (18): Malkovro de misteroj de la "Monda Tegmento"	50
Teatro kun eminentaj artistoj	63
La kulturo de la antikva Djan-regno	36
VOJAGŬ TRA ĈINIO: Ĉerivera urbo Uhan	30
Paco — celo kaj espero de la homaro	40
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Sur la Leŭsa Altebenaĵo (Kolora bildoserio)	56
AMUZO	68
KURANTAJ AFEROJ	60
ĈINLINGVA KURSO	66

SUR LA KOVRILO: Komuna deziro (Akvarelo) de JEN JU

INTERNE DE LA KOVRILO: Ĉarma montarbaro Foto de HE ŜIAŬ

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Bronza blovinstrumento en formo de kalabaso
Foto de ZOŬ JONGĈJONG

SUR LA DORSKOVRILO: Feino sur akvo (Ĉinstila pentraĵo) de DAJ SONGGENG

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Dln.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	5.00	US\$	6.50



Saluto de la alta protektanto de la 71-a UK

S-ro Peng Zhen

Al la 71-a Universala Kongreso de Esperanto

Mi gratulas vin okaze de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĉinio.

Lingvo estas komunikilo de la homaro por interŝanĝi pensojn. La centjara ekzisto de Esperanto pruvas, ke Esperanto estas vivopova internacia helpa lingvo. Tre laŭdin-

ĈEN HAŬSU¹:

Bonvenon al esperantistoj el diversaj mondpartoj

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Pekino en julio 1986, antaŭ la centjara jubileo de Esperanto. Tio estos evento kun grava signifo en la historio de Esperanto. Mi sincere bonvenigas la pli ol mil diverslandaj esperantistojn en la nomo de la Pekina Popola Registaro!



La aŭtoro

Jam antaŭ longe ĉinoj prezentis idealon pri la granda harmonio de la homaro, tial ili facile komprenas la celon de d-ro Zamenhof krei Esperanton kaj havas grandan simpatian al ĝi. Jen grava kaŭzo, kial Esperanto povas venki malfacilon kaj disvastiĝi en Ĉinio kun originala orienta

das la senlaciaj penadoj de la esperantistoj de la tuta mondo por komuna lingvo de la homaro. Havigante al la samideanoj, kiuj bataladas por la komuna deziro, la okazon kolektiĝi, interkonsiliĝi kaj diskuti, la Universala Kongreso de Esperanto kontribuas por plifortigi kompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj de la mondo, por defendi la mondpacon kaj akceli la progreseman aferon de la homaro.

Mi tutkore esperas, ke la diverslandaj amikoj, kiuj partoprenas en la ĉi-jara Kongreso, havos agrablan restadon en Ĉinio kaj pliriĉigos siajn konojn pri Ĉinio kaj ĝia popolo.

Mi deziras plenan sukceson al via Kongreso.

Peng Zhen

Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko

kulturo. En la pasintaj pli ol 70 jaroj multaj eminentaj ĉinaj intelektuloj senlace klopodis por propagandi kaj disvastigi Esperanton. Lusin², U Juĝang³ kaj Hujucz⁴ estis elstaraj reprezentantoj el ili. Kvankam iuj ĉinaj politikistoj, kiaj Maŭ Zedong⁵, Ĝoŭ Enlaj⁶ kaj Ĉen Ji⁷, ne estis esperantistoj, tamen ili donis fortan subtenon al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio. Jam en 1963 marŝalo Ĉen Ji proponis okazigi UK en Pekino. Trairinte 23-jaran malfacilan kaj zigzagan vojon, oni fine realigis lian deziron. Kia ĝojo! Tiu neordinara travivaĵo montris la persistemon kaj obstinon de la ĉinaj esperantistoj kaj la grandan vivforton de la Esperanta movado. Ni esprimas sinceran gratulon al la movado.

Laŭ la vidpunkto de senĉesa evoluo de la mondo, la pli ol dudek jaroj pasis ne vane. Ni pagis multe por akiri progreson, tamen ni ankaŭ gajnis tre multe. Ekz., la ĉina Esperanta movado en la lastaj 7-8 jaroj progresis pli multe ol en la antaŭaj dekoj da jaroj. En Pekino oni okazigis pli ol cent kursojn de Esperanto, en kiuj lernis ĉ. 3 000 personoj. Multe pliiĝis la nombro de

Esperantaj grupoj kaj esperantistoj vizitantaj Pekinon. En Pekino oni kompilis kaj eldonis Esperantajn vortarojn kaj legaĵojn kun totala kvanto de pli ol centmil ekzempleroj. Dank' al tiuj sukcesoj Pekino fariĝis vera centro de Esperanta movado en Ĉinio. La 71-a UK en Pekino des pli pruvis tiun fakton.

Pekino estas la politika kaj kultura centro de Ĉinio kaj ankaŭ la centro de internacia komunikado por la ĉina popolo. Pekino nun marŝas al la celo de moderna internacia urbego. Disvastigo de Esperanto estas utila al la amikeca kontakto de la ĉina popolo kun alilandaj popoloj kaj al la realiĝo de frateco kaj paco inter la homoj, tial ni, kiel la antaŭaj politikistoj, subtenas la disvolviĝon de la Esperanta movado. Ni bone scias, ke Pekino povas stariĝi inter la urboj de la mondo nur per disvolvo de sia originala, tradicia nacia kulturo. Okaze de la 71-a UK ni esprimas al ĉiuj esperantistoj nian bondeziron per jenaj ĉinaj tradiciaj vortoj:

“Ni ĝojas, ke amikoj venas de malproksime!” Ni bondeziras, ke niaj amikoj vivu en Pekino kiel hejme kaj post neforgesebla restado kunportu hejmen la amikecon de la pekinaj loĝantoj.

1. *La aŭtoro estas vicurbestro de Pekino, honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj membro de la Honora Komitato de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto.*

2. *Lusin (1881-1936), granda moderna literaturisto de Ĉinio.*

3. *U Juĝang (1878-1966), eksrektoro de la Ĉina Popola Universitato kaj eksprezidanto de la Komisiono por Reformado de la Ĉina Skriba Lingvo.*

4. *Hujucz (1896-1986) estis vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.*

5. *Maŭ Zedong (1893-1976) estis granda marksisto kaj granda gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo.*

6. *Ĝoŭ Enlaj (1898-1976) estis ĉefministro de Ĉinio, de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko ĝis sia morto.*

7. *Ĉen Ji (1901-1972) estis urbestro de Ŝanhajo, vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj.*

Pekino — kongresurbo de la 71-a UK

de LI ĈJANG

La 71-a UK okazos en Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, je la fino de julio kaj la komenco de aŭgusto ĉijare. Ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj kunvenos en tiu ĉi antikva urbo kun longa civilizaĵa historio. Se vi estas partoprenanto de la UK, vi certe deziras informiĝi pri ĝiaj pasinteco kaj nuntempo kaj promenadi sur stratoj por propraokule rigardi la realan vivon de urbanoj kaj, kompreneble, viziti historiajn vidindaĵojn kaj pitoreskejojn.

En Pekino vi vidos ruinojn de prahoma aktivado. Sur la Drak-


osta Monto apud la urbeto Ĝoŭkoŭdjan 50 kilometrojn sudokcidente de la urbo troviĝas kavernoj de prahomoj, kiuj vivis antaŭ 600 000 — 700 000 jaroj. Oni nomas ilin ĉinaj prahomoj aŭ pekinaj prahomoj. Ili sciopovis fari nepoluritajn ŝtonajn ilojn kaj uzi fajron. En la kaverno ĉe la supro de la Drakosta Monto oni elfosis tri nedifektitajn fosiliajn kraniojn kaj ostojn, kiuj reprezentas la tipon de neoantropoj, kiuj vivis antaŭ 50 000 jaroj, kaj servas kiel valoraj materialoj por studi la homan evoluon. Nun tie estas ekspoziciejo


kaj ruinoj de kavernoj de prahomoj.

Antaŭ pli ol 3 000 jaroj tie jam aperis citadelo. Antaŭ 2 000 jaroj ĝi estis la ĉefurbo de la malgranda regno Ĝji. Kaj poste la urbo fariĝis strategie grava loko kaj la centro de komerco kaj trafiko en norda Ĉinio.

Kun dekadenco de Tang-dinastio (618-907 p. K.), Ĉjidanĝento en nordorienta Ĉinio fondis Ljaŭ-reĝimon en 907 p. K. kaj prenis la urbon Ĝji kiel sian rezidejon, nomante ĝin Nanĝing (suda ĉefurbo) aŭ Janĝing. En

Tjan'anmen-pordego





La Imperiestra Palaco

la komenco de la dekdua jarcento Njuĝen-gento renversis Ljaŭ kaj fondis Ĝin-reĝimon. En 1153 p. K. ĝi oficiale prenis la urbon kiel sian ĉefurbon kaj alinomis ĝin Ĝongdu. Poste Jŭan-dinastio faris plikonstruadon sur la bazo de Ĝongdu. Tiam ĝi servis kiel la ĉefurbo de Jŭan-dinastio kaj estis nomata Dadu. De tiam Pekino fariĝis politika centro de la tuta lando. Ming- (1368-1644 p. K.) kaj Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.) prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. La urbo estis ornamita per fortikaj ĉirkaŭmuroj, luksa Imperiestra Palaco kaj ĉarmaj ĝardenoj kaj fariĝis unu el la plej grandaj urboj en la mondo.

Pekino kiel antikva ĉefurbo nun ankoraŭ konservas la konstruan dekoracion de la Imperiestra Urbo. La Imperiestra Palaco (alinome Malpermesita Urbo) en la centro de la urbo estas ĉirkaŭita de ortangulaj muroj. Kaj ĉirkaŭ ĝi siatempe staris imperiestraj karmezinaj muroj kun perimetro de 9 km. Nun

jam malkonstruiĝis la muroj orienta, norda kaj okcidenta. Ekster la Imperiestra Urbo estis la interna kaj ekstera urboj, ĉiu kun dikaj muroj. La antaŭa estas kvadrata, kun perimetro de 20 km, kaj la lasta, brakumante la sudan parton de la interna urbo, estas ortangula. La muroj de la interna kaj ekstera urboj havis sume dudek pordegojn kun impona turo. Nun krom la turoj Ĝengjangmen, Ĝjanloŭ, Deŝengmen k.a., kiuj estas bone konservitaj kaj riparitaj, la muroj kaj aliaj turoj estis malkonstruitaj.

Se vi ascendas la mezan montpinton de Ĝingŝan, vi trovas la akson meze de la Imperiestra Palaco, kiu komenciĝas de Jongdingmen-pordego meze de la ekstera urbomuro en sudo, trairas Ĝengjangmen-pordegon de la interna urbomuro, Tjan'anmen-pordegon de la Imperiestra Urbo, Umen-pordegon de la Malpermesita Urbo, la centron de la Imperiestra Palaco, la nordan pordon de la Malpermesita Urbo Ŝen'umen, la mezan pinton de

Ĝingŝan-monto, la Tamburan Turon, kaj finiĝas ĉe la Sonorila Turo, kun totala longo de 8 km. Ambaŭflanke de la akso sterniĝas stratoj simetrie en formo de ŝaktabulo. La larĝaj stratoj ĝenerale etendiĝas de sude norden, dum la stratetoj, kiuj interligas sin kun larĝaj stratoj, plejparte kondukas de oriente okcidenten. La stratoj kaj konstruaĵoj estas simetrie dispoziitaj.

La grandioza kaj pompa Imperiestra Palaco en la urbocentro antaŭe superis ĉiujn aliajn konstruaĵojn en alto. Nun multaj domoj konstruitaj en la lastaj 30 jaroj rompis la limigon de alto kaj disetendiĝas al la antaŭurboj, kaj la pasintaj sovaĝaj tombejoj fariĝis movoplenaj stratoj. Tamen rigardate de konservado de la origina fizionomio de la antikva ĉefurbo, tia tendenco estas malkonsilinda.

Tjan'anmen-pordego estas la suda pordo de la Imperiestra Urbo. Ĝi estas la simbolo de Pekino kaj ankaŭ tiu de Ĉinio.

Ĉiuj, kiuj vizitas Pekinon, senescepte deziras rigardi ĝin. Antaŭ la pordego estis kortega placo. Antaŭe al la civiluloj estis tute malpermesite eniri en ĝin. De la kvindekaj jaroj la areo de la placo plivastiĝis de dek unu ĝis kvardek hektaroj. Nun ĝi estas loko por mitingo kaj promenado. Ĉirkaŭ la placo kuŝas la Popola Halo, Ĉina Historia Muzeo, Ĉina Revolucia Muzeo, Monumento de Popolaj Herooj kaj Memorhalo de Prezidanto Maŭ Zedong. Antaŭ Tjan'anmen-pordego stariĝas strato kun larĝeco de 60-70 metroj, trairante la urbon de ok-

cidente orienten. Ambaŭflanke de la strato staras domegoj de registaraj oficejoj kaj aliaj konstruaĵoj.

Oni pavimis larĝan ĉirkaŭurban straton sur la bazo de la malkonstruitaj muroj de la interna urbo. Pekino estas regno de bicikloj, kies nombro atingis kelkajn milionojn. Tial la ĉirkaŭurba strato de Pekino estas dividita en du liniojn: Unu por bicikloj kaj la alia por aŭtoj. Kaj ĉe vojkruciĝoj estas konstruitaj naŭ trefkruciĝoj. Por mildigi la streĉan trafikon en la urbo oni


konstruis metroon sub la ĉirkaŭurba strato, kiu kune kun la surteraj stratoj formas trafikanton.

Pekino kiel fama historia kaj kultura urbo havas multajn antikvajn restaĵojn, ruinojn kaj historiajn objektojn. La Imperiestra Palaco, la Ĉiela Altaro, la Somera Palaco, Bejhaj-parko, la Kultura Palaco de Laboruloj, Ĝongŝan-parko, Ĝingŝan-parko, Ŝjangŝan-parko, la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio, la Granda Muro ĉe Badaling, ĉiuj estas admirindaj vidindaĵoj.

En Pekino estas 62 altlernejoj, kiaj la Pekina Universitato, Ĉinghŭa-universitato, multaj scienc esploraj instancoj, kiaj la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj. Tie troviĝas la Pekina Biblioteko, kiu havas plej multajn librojn en Ĉinio, muzeoj, ekspoziciejoj, belarta domo kaj multaj aliaj kulturaj organizoj por novaĵoj, disaŭdigo, eldonado, teatro, filmo ktp.

Krome, Pekino estas ankaŭ la centro de la ĉina Esperanto-movado. Tie estas la Ĉina Esperanto-Ligo, la societo "Amikoj de Esperanto", la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Pekina Esperanto-Asocio, la Redakcio de El Popola Ĉinio, la Ĉina Esperanto-Eldonejo, la Esperanto-sekcio de Radio Pekino k. a. Tiuj Esperantaj institucioj ludas aktivan rolon en akcelado de nia movado kaj oftigo de amika kontakto inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

Statuo de knabino, farita imite al pekina prahomo post restarigo de krania fosilio



POR LA 71-A UK

Kongresaj spektakloj plenaj de ĉinaj naciaj gustoj

de SAŬ BIN

Laŭ la moro de ĉinoj oni eksplodigas petardojn kaj ludas surnaon (simpla blovinstrumento simila al hobojo) en festoj aŭ ĉe celebrindaj aferoj. Kaj kia amuzaĵo taŭgos por la 71-a UK okazonta en Ĉinio? La membroj de LKK longe cerbumis pri tio, kaj fine Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala se-

kretario de ĈEL, decidis aranĝi facile kompreneblajn spektaklojn plenajn de ĉinaj naciaj gustoj.

La spektaklojn plenumos artistoj de la Ĉina Akrobata Trupo,

La tradicia akrobataĵo "Ludo per Tasoj"



Pava danco

la Centra Kanto-danca Ensemblo de Ĉinio kaj la Ĉina Pekin-opera Trupo. La programo konsistas el leona danco, akrobataĵoj de bovlo-survertigo, piedludo de ombrelo kaj permana staro sur pluraj seĝoj, silk-rubanda danco, ĉeval-tintila danco, pava danco, solkanto, kunludo de ĉinaj naciaj instrumentoj kaj sceno el la pekina opero "Disvojiĝo".

Leona danco estas popola amuzaĵo, kutime ludata en festoj. En la 71-a kongreso akrobatoj ludos leonan dancon. En la danco du akrobatoj ludas en unu leona felo kaj devas bone kunagi. Krom diversaj movoj de leono ili devas ankaŭ ruli globon starante sur ĝi kaj transiri ponteton duope. En ore flava felo kaj akompanate de frapado de perkut-instrumentoj, la artistoj faras diversajn movojn de leono. La danco certe profunde impresos la rigardantojn.

Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj. Krom la leona danco


de han-nacieco, oni prezentos ankaŭ dancojn de nacimalplimulto, ekzemple pavan dancon de taj-nacieco, ĉeval-tintilan dancon de tibeta nacieco. Pavo estas simbolo de feliĉo. La ĉefaj movoj de la danco originas el la elegantaj kaj sveltaj movoj de dancoj de taj-nacieco. La danco akompanata de taj-nacieca muziko reliefe montras la mildecon de orienta virino kaj prikantas pacon kaj kvietecon. La ĉeval-tintila kaj pava dancoj estas tute malsamaj en stilo. La muziko kaj movoj de la antaŭa estas ĉerpitaj el tibetaj muziko kaj danco. La bravaj movoj de junaj aktoroj montras altan rajdarton kaj bravvan virecon de tibetanoj.

La lasta programero estos la pekina opero "Disvojiĝo", kiun oni jam multfoje prezentis eksterlande. La du roluloj batalas unu kontraŭ la alia en "mallumo". La batalo estas danĝera kaj streĉa, tamen komedia.

Pro la limigo de la paĝoj mi ne povas pli detale priskribi la programon. Kiel ĉina proverbo diras, unu vido pli taŭgas, ol dek aŭdoj. Ni esperas, ke kongresanoj ŝatos la spektaklojn.

Estas menciinde, ke oni ankoraŭ donas proponojn pri la enhavo de la spektakloj, la programo estos eventuale ŝanĝota, tamen la ŝanĝo sendube celos ĝian perfektigon.

Sceno el "Disvojiĝo"



ESP-NOVAĴOJ

ESPERANTO EN LA PEKINA LINGVA INSTITUTO

En la unua duono de la nuna jaro Esperanto estis instruata kiel nedeviga lernobjekto en la Pekina Lingva Instituto. En la lernado partoprenis pli ol 100 studentoj el la fremdlingva fakultato kaj la lingva kaj literatura fakultato. S-ro Li Ŭejlun instruis kvar horojn ĉiusemajne. Oni finlernis la lernolibron "Elementa Esperanto-Kurso" (en du partoj) en la daŭro de 18 semajnoj. Inter la partoprenantoj estis tri ĉinaj instruistoj kaj unu usonano, kiu studis en Ĉinio. Samtempe kun tio, la Pekina Esperanto-Asocio fondis Esperanto-kurson en la instituto. En la kurso lernis ankaŭ studentoj el Japanio, Kolombio, Ekvadoro kaj Kongolo.

LABORKUNVENO DE LA NINGŝJA-A ESPERANTO-ASOCIO

La 2-an de marto la nomita asocio okazigis sian laborkunvenon en Jinĉŭan, la ĉefurbo de la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, kun 300 ĉeestantoj, inkluzive de regionaj gvidantoj Ŭang Janŝin kaj U Ŝangŝjan, respondeculoj de rilataj departementoj kaj membroj de la asocio. En la kunveno prezidanto de la asocio Liŭ Ŝan raportis la Esperantan laboron en la lastaj jaroj.


Nome de la regionaj partia komitato kaj popola registaro Ŭang Janŝin faris parolon.

Raportistoj de la Ningŝja-a Televida Stacio, la Ningŝja-a Radiostacio kaj la redakcio de la Ningŝja-a Ĵurnalo informis pri la kunveno.

Pro ia kaŭzo prezidanto de la regiono Hej Boli ne ĉeestis la kunvenon. Post la kunveno li de- mandis pri detaloj, esprimis sian



S-ro Ŭang Janŝin skribas por la laborkunveno. S-ro Liŭ Ŝan raportas en la kunveno.



intereson pri Esperanto-movado kaj esperis partopreni en la venontaj kunvenoj.

TELEVIZIA ESPERANTO-KURSO EN ĈINGHAJ

Ekde januaro ĉi-jare la Ĉinghaja Televida Stacio telesendas Esperanto-kurson de la 19-a ĝis kvarono post la 19-a. Tio estas la unua televida programero de Ĉinio pri Esperanta instruado.

GRANDA FAKA BIBLIOGRAFIO DENOVE HAVAS ESPERANTAN SEKCION

Verŝajne la plej granda kaj plej kompleta jara bibliografio de verkoj pri la lingvo kaj literaturo de Esperanto estas tiu, kiu aperas en *MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures*. La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo; en la dua kaj kvara volumoj aperas pliaj eroj Esperantaj. Ĉio kune donas bonan superrigardon de la laboro de esperantologoj dum la koncerna jaro.

SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ EN LINGVOLABORATORIO

La komitato de Hungara Esperanto-Asocio en departemento VAS

aranĝos aŭdvidajn kursojn de Esperanto en lingvolaboratorio, en la moderna kulturcentro de la urbo Szombathely.

Ĝis nun pli ol 70 procentoj de la partoprenintoj estis eksterlandanoj el dek landoj. Instruado okazos de la 8-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1986 en tri diversaj grupoj: por netaj komencantoj, por komencantoj kaj por progresintoj.

"ESPERANTO: VOJO AL LA PACO"

Tiu estas la temo de la 57-a Nacia Kongreso de Esperanto

kune organizita de la Itala Esperanto-Federacio kaj la Bolonja Esperanto-Grupo "Achille Tellini" inter la 29-a de aŭgusto kaj la 3-a de septembro 1986.

LA INTERNACIA LITERATURA KONKURSO POR POEZIO

Okaze de la 100-jara jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto, la distrikta estraro de la Bulgara Esperantista Asocio en la urbo Stara Zagora organizas la Internacian Literaturan Konkurson por Poezio en Esperanto. Detalajn informojn pri la konkurso bonvolu peti de la organizanto.

S-ino Carla de Lorenzi (staranta), kiu vizitis Ĉinion, faras en Italio prelegon pri Pekino kaj aliaj urboj.



Tangŝan, dek jarojn post la tertremo


La 28-a de julio en la kuranta jaro estas la deka datreveno de la forta tertremo en la urbo Tangŝan, kiu skuis la tutan mondon. Nun ni publikigas jenajn artikolojn skribitajn de niaj raportistoj post ilia vizito al la nova Tangŝan, por ke niaj legantoj, kiuj zorgas pri tiu urbo, pli bone konu ĝian nunon.

La Red.

Ĉu miraĝo?

de ĈUAN BJAŬ

Ruino kaŭzita de la tertremo



Mi plurfoje vizitis Tangŝan kaj diris al aliaj, ke se Tangŝan translokiĝus, mi ankoraŭ povus rekonigi ĝin. Neatendite ĉi-foje mi perdadis la vojon irante en la urbo, kaj devis demandi pasantojn pri la vojo.

Fakte mi konis nur la malnovan Tangŝan kaj ne la novan. Laŭ mia memoro Tangŝan havis nur malaltajn kaj malnovajn konstruaĵojn, mallarĝajn kaj hom-interpuŝigajn stratojn kaj la tuta urbo kvazaŭ estis kovrita de karbopulvoro. Frumatene de la 28-a de julio 1976 okazis 7.8-grada tertremo, kiu ruinigis preskaŭ 100% de la loĝdomoj kaj 95% de la publikaj konstruaĵoj, mortigis pli ol 200 000 ho-



Nova strato

mojn kaj grave vundis pli ol 100 000. Tamen ĝia antikva figuro kaj ĝiaj fame konataj produktaĵoj, karbo kaj porcelanaĵoj, ankoraŭ restas en mia memoro.

Kvin jarojn post la tertremo mi vizitis tiun urbon. Tiam oni estis en intensa laborado por restarigi la produktadon kaj konstrui loĝdomojn. Post tio pliaj kvin jaroj pasis, kaj mi refoje vizitis ĝin. La trajno trapasis la antaŭurbon de Tangŝan post vesperiĝo. Mi rigardis tra la fenestro kaj vidis sennombrajn flagrantajn lampojn, vicajn da altaj etaĝdomoj malklare konturitaj sur la ĉiela fono kaj viglan stratan trafikon. Tiam en mia cerbo aperis la vorto "miraĝo". Mi forlasis la stacidomon, kaj apenaŭ mi ekhavis tempon por pririgardi la ĉirkaŭaĵon, aŭto jam portis min al la hotelo Tangŝan. Mi loĝis en dulita ĉambro en la 7-a etaĝo. La ĉambro estas ekipita per kolora televidilo, sofo kaj tapiŝo, kun banĉambro. La ĉambroj de la hotelo dividiĝis en tri klasojn, kaj mia ĉambro estas triaklasa. Mi kuŝis en la lito kaj neniel povis endormiĝi dum longa tempo. En mia memoro re-

Ĉefinĝenero Ŝje Zongju, projektinto de la rekonstruado de Tangŝan



aperis la simpla gastejo de la malnova Tangŝan kaj ĝia ruino post la tertremo, kaj mi ekmiris antaŭ la luksa hotelo.

En la sekvanta mateno mi iris el la hotelo kaj vidis sur la longa larĝa strato Ĝjanŝe plurajn hotelojn kaj altajn restoraciojn, magazenojn k.s. Malantaŭ tiuj konstruaĵoj estas vicaj da 4-5-etaĝaj loĝdomoj. Iu malnova Tangŝan-ano diris al mi, ke nun la totala plank-areo de tiaj loĝdomoj atingis jam 10.74 milionojn da kvadrataj metroj, sed ili an-

koraŭ ne povas kontentigi la bezonon, ĉar la loĝantoj de Tangŝan plimultiĝis de 165 000 familioj antaŭ la tertremo al 220 000.

Tiu malnova Tangŝan-ano nomiĝas Ĝaŭ Ĝengong. Antaŭ la tertremo li estis projektanto de urbokonstruado de Tangŝan kaj nun estas unu el la respondeculoj de la projekta sekcio de la Komisiono por Urba kaj Kampara Konstruado de Tangŝan. Renkontiĝinte mi diris al li mian novan impreson kaj novan opinion.

“Nenio miriga!” li diris. “Vidante tiel grandan ŝanĝigon de Tangŝan, eĉ ni Tangŝan-anoj sentas nin kvazaŭ en sonĝo. Sed kiel ni povus dubi pri nia laboro.” Pro tio mi petis lin rakontisian historion.

Kiam okazis la tertremo, Ĝaŭ Ĝenĝong estis en oficvojaĝo. Informiĝinte pri la tertremo en la hejmurbo, li tuj rapidis al Tangŝan kaj vidis nur ruinon kaj navetajn ambulancojn. Kvantkam liaj familianoj postvivis la katastrofon, tamen li sentis grandan ĉagrenon pro la tragika sorto de siaj samlokanoj kaj la ruiĝo de Tangŝan. Kun peza koro li sin ĵetis en batalon por riparado. Post nelonge li kaj inĝenieroj, venintaj el Pekino, Ŝanhajo, Ŝenjang kaj Ŝjian por helpi Tangŝan, kune starigis kabanojn en la flughaveno de la antaŭurbo kaj komencis projekti rekonstruadon de Tangŝan. La tertremo detruis ĉiujn desegnaĵojn de urbo-konstruado, kio multe malfaciligis la projektan laboron; cetere, Tangŝan estis fremda al la projektantoj el aliaj lokoj kaj laboro iris ne glate. Li koniĝis al ili la geografion de Tangŝan kaj la bonan kaj malbonan dislokiĝon de la konstruaĵoj. Krome li ellaboris konkretajn konstruajn projektojn kune kun ili. En tiuj neforgeseblaj tagoj li ne ripozis eĉ unu tagon. Ĉiutage li laboris ĝis noktomezo. Iam li eĉ kuŝis sur mato sur la planko de kabano.

En la sekvanta jaro la supera instanco sankciis la de ili ellaboritan Ĝeneralan Projekton por Rekonstrui Tangŝan, laŭ kiu la nova Tangŝan konsistas el tri kvartaloj Laŭŝi, Dongkŭang kaj Fengjun. Laŭŝi estas por loĝado kaj komercado, en Dongkŭang estas kvin minejoj kun Kajlŭan-karbonejo kiel la ĉefa, kaj

Fengjun estas kvartalo de manĝaĵa kaj aliaj malpezaj industrioj. La projekto apartigis la industrian kvartalon disde la loĝkvartalo, utiligante monteton kaj riveron trafluantan la urbon. Tiu projekto ŝanĝis la malracian dislokiĝon de kvartaloj por malsamaj uzoj kaj intermiksiĝon de fabrikoj kun loĝdomoj, kio estas utila al la produktado, vivo kaj medio-protektado.

Por ke mi bone konu la novan Tangŝan, Ĝaŭ Ĝenĝong gvidis min en vizito de la urbo. En la kvartalo Ŝugŭang kun 50 000 loĝantoj la loĝdomoj dividiĝis en grupojn, kaj ĉiu grupo estis ĉirkaŭmurigita. Proksime al domoj estas eleganta parketo kun laŭbo, gazono, florbedo, fontano kaj rokaĵo. Escepte en vintro, la parketo estas frekventata de proksimaj loĝantoj. Tie ili promenas, ripozas aŭ okazigas vesperan amuz-kunvenon.

Mi forlasis la kvartalon kaj veturis al la stratoj de manĝaĵoj kaj tradiciaj produktaĵoj. La du stratoj ne malproksime distancaj unu de la alia logis min per malgrandaj pavilonoj de delikataj strukturoj. Sur la manĝaĵa strato oni vendos lokajn manĝaĵojn, ekzemple sezamaj sukeraĵoj kaj stufitaj kokoj. La strato de tradiciaj produktaĵoj fariĝos centro de malgrandaj tradiciaj komercaĵoj de diversaj lokoj de la lando. Estas bedaŭrinde, ke la du stratoj ankoraŭ ne inaŭguriĝis. Kaj mi ne povis frandi bongustajn lokajn etmanĝaĵojn kaj aĉeti ŝatatajn objektojn.

Revenvoje mia aŭto haltis apud la placo okcidente de la urbocentro. Tie staras alta monumento kun ideografiaĵoj “Monumento de la Tertremo”. La ĉefa parto, kun alteco de pli ol 30 metroj, konsistas el kvar ferbetonaj kolonoj, kio simbolas la

bravecon de la popolo en batalo kontraŭ la naturo. Sube estas kvadrata bazamento el ok reliefoj, signifantaj la subtenon de diversaj lokoj de la lando. La 28-an de julio de la kuranta jaro, eĉ la 10-a datreveno de la tertremo, okazos sur la placo solena inaŭguro de la monumento.

“Ĉu la inaŭguro povos marki la fundamentan finon de la Ĝenerala Projekto por Rekonstrui Tangŝan kaj oni povas turni sin al la fina rekonstruado?” demandis mi.

“Jes. Sed la ero de rekonstruado estas ne facila,” respondis li. “Ĉar ni okupiĝis ĉefe pri konstruado de loĝdomoj, kaj malfrue komenciĝis la konstruado de altaj publikaj konstruaĵoj ambaŭflanke de la stratoj. Krome multaj publikaj konstruaĵoj kaj loĝdomoj atendas kompletigon.”

Ĉiumatene mi rigardis malproksimen starante antaŭ la fenestro kaj povis vidi tiujn konstruejojn kaj preskaŭ monotonajn loĝdomojn. Pro polucio de kelkaj fabrikoj griza polva nebulo saturis la aeron, kio malhelpis al mi la vidadon. Iuj fabrikoj alportis polucion pro hasta komenciĝo de konstruado sen sufiĉa konsiderado, sed nun mankas tempo por rekonstruado kaj translokado. Pro hasteco en loĝdoma konstruado oni aplikis nur unu-du desegnaĵojn kontraŭsismajn kaj tempoŝparajn. Nun oni faras publikajn konstruaĵojn kun akcento de bela aspekto kaj unueca stilo por forigi la antaŭajn mankojn kaj plibeligi la urbon.



La nova hotelo Tangŝan

Nova fizionomio de Tangŝan

Fotoj de TANG ŜING



*Infanoj naskitaj
post la tertremo*

Gardeno inter loĝdomoj





En trikejo






La nova urbo Tangŝan

Tangŝan estas konata kiel porcelana ĉefurbo de norda Ĉinio. Jen laborejo de iu porcelana fabriko.





Sciencistoj en eksperimentado

Karboministoj uzas novan maŝinon.



Li portas duoblan taskon

de GE ŜI

Rompita cementa plato elstaras el tegolrubo, tordita relo de rulponto etendiĝas malsupren laŭ oblikva murkolono. Kvankam pasis dek jaroj de post la tertremo, tamen tiu animskua vidaĵo prezentas al ni teruran katastrofon.

Tiu ruino kaŭzita de la tertremo, kun speciala monumento por ĝi, estis muldejo de la Tangŝan-a Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj. La muldejo kun areo de pli ol 9 000 kvadrataj metroj kaj alteco de pli ol 20 metroj detruigis en palpebruma daŭro de la tertremo.

Post dek jaroj mi vidis apud la ruino, ke nova lokomotivo malrapide moviĝas kaj la laborejo plenas de streĉa atmosfero. Kvankam la tertremo postlasis siajn signojn, tamen la nova vivo jam ekfloris sur la ruino. Respondeculo de la fabriko s-ro Ŭang Ĝongĝeng diris al mi, ke oni ne nur restarigis la produktadon, sed ankaŭ konstruis novan fabrikon en la nova distrikto Fengjun, norde de la urbo. Post ekfunkciado de la nova fabriko ĝiaj produktokvanto kaj produktoskalo multe superos tiujn de la malnova fabriko.


Ŭang Ĝongĝeng aĝas 50 jarojn. Sur lia vizaĝo oni ne vidas eĉ ombbron da laceco kaj peza ŝarĝo de la vivo. Sed eksciinte, ke lia edzino suferas paraplegion kaŭzitan de la tertremo kaj li devas ĉiutage zorgi pri ŝi, mi ne

povis ne kortuŝiĝi de lia granda energio.

Antaŭ dek jaroj la tertremo premvundis lian edzinon kaj lian kranion kaj rompis liajn piedfingrojn. Post kuracado en Pekino en 1978 li kaj lia edzino revenis hejmen. La fabriko permesis al li unue zorgi pri sia edzino kaj due labori. Tiam la fabriko batalis por savi sin el la katastrofo kaj restarigi la produktadon. Li estis vagon-projektisto. Vidinte, ke multaj teknikistoj de la fabriko mortis aŭ vundiĝis kaj restas nur kelkaj sanaj, li estis tre maltrankvila. Li konsiliĝis kun sia edzino kaj decidis, ke li ne ĉiam estos en la hejmo. Li do prezentis al la fabriko sian peton partopreni projektadon.

Li bone aranĝis hejmlaborojn. Ĉiutage li ellitiĝis je duono post la kvina, poste preparis matenmanĝon kaj flegis la edzinon. Je la oka li venis al la fabriko. Je duono post la naŭa li devis reveni hejmen por helpi la edzinon feki kaj sin ekzerci per paralelo. Kaj poste li reiris al la fabriko. Je duono post la kvara posttagmeze li devis reveni hejmen denove. Tagmeze kaj vespere li devis prepari manĝon, lavi vestojn, helpi la edzinon turniĝi k.a. En tia situacio li partoprenis projektadon de kunmetita lokomotivo-vagono. En 1982 li prenis sur sin la taskon projekti vagonon kun molaj kaj malmolaj seĝoj. Li kun nombro da junuloj ĉiutage longigis la labortempon je du horoj kaj eĉ ne ripozis diman-

Ruino de la Tangŝan-a Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj



ĉe. Post kvar monatoj ili bone plenumis la taskon.

Vidinte, ke li estas tre okupita ne nur en la hejmo, sed ankaŭ en la fabriko, lia edzino pensis, ke ŝi malhelpas lin, kaj venis al ŝi en la kapon la ideo sin mortigi. Tion rimarkinte, la edzo persvadis ŝin kaj helpis ŝin lerni la japanan lingvon, por ke ŝi povu traduki scienc-teknikajn materialojn. Per sincera amo li kuraĝigis sian edzinon daŭre vivi. Kun siaj elstara laboro kaj moralaj agoj li estis elektita en 1985 kiel respondeculo de la fabriko. Mi demandis lin, ĉu tedis lin la prizorgado al la edzino kaj laborado en la fabriko dum la pasintaj dek jaroj. Li respondis, ke li estis vere laca, precipe en la jaroj tuj post la tertremo, sed li sentis la vivon enhavoriĉa, vidinte la restariĝon de la produktado kaj la gajan mienon de la edzino. Li ne havis tempon pensi pri "tedo".

Orfo-laboristo




Ja estas granda feliĉo el la mal-feliĉo, ke la edzino povas postvivi la tertremon.

Dum la intervjuo en Tangŝan, ni renkontis multajn homojn kiel

Ŭang Ĝongĝeng. Ankaŭ ĉefingenero de la Minej-administra Buroo de Kajlŭan s-ro Li Ĉengdong estas unu el la postvivantoj, kiu rampis el tegolrubo. Tiam li estis ĉefingenero de la minejo

Ŭang Gonggeng (meze) helpas sian edzinon en tradukado de scienc-teknikaj materialoj.





La elektrejo Doŭhe

Tangĝaĝŭang sub la nomita buroo kaj deĵoris en la minejo. Kiam li venis hejmen tutkorpe vundita, la domo estis jam detruita kaj liaj edzino kaj du infanoj viktimiĝis. Sen ploro li aranĝis la aferon kaj tutkore laboris en la minejo. La tertremo detruis la minejon kaj materialojn. Li parkere notis ĉiujn teknikajn donitaĵojn. Li iris la unua al ŝakto por koni la katastrofon, organizi savan laboron kaj restarigi la produktadon. Li diris al mi: "Dum sufiĉe longa tempo mi devigis min energie labori. Mi ne volis liberan tempon, ĉar se mi havus liberan tempon, mi rememorus miajn mortintajn familianojn. Mi preferis labori ĝis elĉerpiĝo kaj tiel povis endormiĝi tuj post enlitiĝo.

Kiel s-ro Li, la plejparto de la tangŝan-anoj turnis sian doloron en grandan energion en laboro por mildigi sian senton. La nova Tangŝan estas restarigita de la tangŝan-anoj sur la ruino. Kiel la Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj, la aliaj fabrikoj de

Tangŝan post la tertremo ne nur restarigis la produktadon, sed multe plialtigis la produktan nivelon kompare kun tiu antaŭ la tertremo, kun helpo de la tutlanda popolo. Mi informiĝis, ke ĝis la fino de 1985 la totala produktovaloro de Tangŝan duoble pli multiĝis ol tiu en la rekorda jaro antaŭ la tertremo. La urbo kun la industrioj karba, elektra, metalurgia kaj konstrumateriala kiel la ĉefaj disvolvis ankaŭ la industriojn ceramikajn, tekstilan, maŝinan, elektronikan kaj kemian.

La Minej-administra Buroo de Kajlŭan, la dua granda karbominejo de Ĉinio, havas dek malgrandajn minejojn kun totala jara produktokvanto de pli ol dudek milionoj da tunoj da karbo. Inter ili Fangeĝŭang estas granda meĥanizita ŝakto konstruita de Ĉinio mem. Ĝia nova karbolava fabriko, avangarde ekipita kun jara produktokvanto de kvar milionoj da tunoj da karbo, estas la plej granda tiaspeca fabriko en la Malproksima Oriento.

La elektrejo Doŭhe nove konstruita post la tertremo estas ĉefa en la regiono de Pekino, Tjanĝin kaj Tangŝan. Kun generatora kapacito de 1.15 milionoj da kilovattoj ĝi estas la dua granda termoelektrrejo en Ĉinio. Post kiam oni aldonos novan generatoraron kun kapacito de ducent mil kilovattoj, ĝi fariĝos la plej granda termoelektrrejo de Ĉinio.

La cementa fabriko Ĝjidong, kiu fondiĝis en 1984 kaj ludas pli kaj pli gravan rolon en rekonstruado de Tangŝan, estas unu el la plej grandaj cementaj fabrikoj de Ĉinio, kun jara produktokvanto de 1.5 milionoj da tunoj da bonkvalita cemento. Ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estas importitaj el Japanio kaj ĝia tuta produktita procedo regata per komputiloj.

En la cementa produktokvanto Tangŝan okupas la unuan lokon en la lando. Ĝia produktokvanto de purigiloj konsistigas duonon kaj tiu de glazuritaj kaheloj kvaronon de la totala produktokvanto de la lando.



La geedzoj Li Suĉing kaj Han Ŭenming

Familioj— spegulo de la urbo Tangŝan

de ĜANG ĈINGĜEN

Tuj kiam mi atingis la urbon Tangŝan, en mia memoro aperis gaja knabineto kun vizaĝo ruĝa kiel pomo kaj paro da brilaj okuloj. Ŝi plaĉis al ĉiuj. Ŝi estis savita post la tertremo en 1976, tamen ŝi fariĝis orfino. Bonkora virino Li Kefen kaj ŝia edzo adoptis ŝin kaj nomis ŝin Ĝenĝjan (ĉinlingve signifanta “sano post tertremo”). En mia artikolo, kiu aperis en EPC n-ro 4, 1978 mi menciis ŝin kaj ŝian patrinon. Ĉi-foje mi deziris tuj vidi ŝin kaj ŝiajn adoptajn gepatrojn.

Iu-vespere mi atingis la hejmon de Li Kefen. Por mi malfermis la pordon pli-ol-10-jara knabino kun paro da harligoj kaj kvazaŭ parolantaj okuloj. Mi demandis: “Vi estas Ĝenĝjan, ĉu ne?” kapjesis ŝi kun miro. Ŝia patrino rekonis min kaj diris al ŝi: “Tiu onkloro venis de Pekino. Ŝi brakumis vin antaŭ 9 jaroj.” La knabineto do intime kaptis mian manon. Nun ŝi fariĝis komprenema. En ŝia parolo sentiĝis la dankemo al ŝiaj adoptaj gepatroj.

Kaŭze de la katastrofo en

Tangŝan estiĝis 2 652 orfoj. Ili ĉiuj vivas feliĉe en la hejmo aŭ lernas en Juhong-lernejo funkciigata de la ŝtato, samkiel Ĝenĝjan. Nun iuj el ili laboras, aliaj lernas en superaj lernejoj.

Oni diris al mi, ke la orfaj geknaboj ricevis eĉ pli da prizorgoj de la socio en la vivo kaj lernado ol la ordinaraj geknaboj. Ilia vivvojo post la katastrofo estis glata. Tamen venis al mi alia demando: kiel statas nun la 7 000 vidvinoj kaj 8 000 vidvoj?

Multaj novaj familioj, kiujn mi vizitis, spertis la procezon de rapida fondiĝo al iom-post-ioma stabiliĝo. Post la tertremo pro la komuna deziro trapasi malfacilajn tagojn iuj haste geedziĝis. Tamen pro manko de solida bazo la geedzeco rompiĝis post nelonge. Oni diris al mi, ke la efemera geedzeco daŭris nur 3 horojn, dum la plej longa tempo ne superis unu jaron. Tial estiĝis tendenco denove fondi familion, kiam la homa sento kvietiĝis. Post kontaktiĝo en certa tempo, oni konis unu la alian, tial simpatio kaj amo donis pli solidan

bazon por la estonta kunvivo. Tamen tio ne signifas, ke ĉio estas bona. Sekve de tio leviĝas la familiaj konfliktoj, kiuj portas socian karakteron. La konfliktoj estiĝas ĉefe pro iliaj gefiloj kaj gepatroj. En la lastaj jaroj la virinaj federacioj de diversaj niveloj multe laboris por solvi la konflikton. Enketo montris, ke 80% de la tieaj familioj vivas harmonie, dum la ceteraj ne glate. Ĝenerale, la familioj kun kompare alta klereco povas bone solvi la problemon.

Mi vizitis mezlernejan instruistaron Gŭo Ŝuĝen kaj ŝian familion. Antaŭ 8 jaroj, kun sia solfileto kiu postvivis la katastrofon, ŝi edziniĝis al Li Ĝjamin, kiu havis du gefilojn. Li Na, la filineto de Li Ĝjamin, estis obstina en ĉio. Post la fondiĝo de la nova familio Gŭo tre kompatis tiun knabineton, perdintan sian patrinon en la infaneco, kaj prizorgis ŝin en la vivo. Post kiam ŝi informiĝis, ke Gŭo estas ŝia duonpatrino, ŝi ofte ofendis Gŭo intence kaj ne diris eĉ unu vorton al Gŭo dum pluraj tagoj. Li Ĝjamin kritikis sian filinon:

“Estas ja ne facile, ke ŝi amflegis vin 8 jarojn.” Kaj Gŭo amis Li Na plu, kiel sian propran filinon kaj samtempe estis rigora al ŝi. Nun kvankam ankoraŭ ekzistas iaj konfliktoj, tamen ili estas bagatelaj kaj pure naturaj inter la patrino kaj filino. El tio estas malfacile trovi, ke la familio estas nove fondita.

Sukcesis ankaŭ la fondiĝo de la familio de Li Ŝuĉing kaj Han Ŭenming. Kiam ili geedziĝis svatite post la tertremo ĉiu el ili havis 3 infanojn, inkl. de orfo adoptita de la edzo Li Ŝuĉing. Ili opiniis, ke ili kunigis la du detruitajn familiojn ĝuste por pli bone vivi, tial ili ambaŭ deziras bone teni la novan familion. En la familia ekonomio ili estas plene egalrajtaj kaj rigardas la duonfilojn kaj duonfilinojn kiel siajn proprajn.

En la plurjara kunvivado Han sentis sian edzon honesta kaj fidinda. En 1985 Han enhospitaliĝis pro cerba hemoragio. La edzo flegis ŝin. Li banis ŝin, lavis ŝiajn vestojn kaj preparis por ŝi bongustajn manĝaĵojn kaj tial li estis laŭdata de la hospitalaj laborantoj kaj malsanuloj.

En la interparolo kun Han, mi vole-nevole tuŝis ŝian antaŭan edzon. Tiam ŝi larmis pro la psika traŭmato. Ŝi estas prudenta kaj malproksimvida, kaj povas racie trakti ĉion. Ŝi diris, ke oni ne povas vivi nur per rememoro pri la pasinteco, sed devas rigardi rekte al la realo.

Kion pensas la gefiloj de ĉiuj novaj familioj? La 26-jara fervojisto U Baŭĝji malkaŝis sian koron: “La anima doloro kaŭzita de la tertremo al mi iom post iom kvietiĝis. Malaperis ankaŭ mia maltrankvilo ĉe la naskiĝo de la nova familio. Nun intimaj estas la rilatoj inter mi kaj miaj duonpatrino kaj duon-

fratoj. La antaŭa muro inter ni ne plu ekzistas. Por tio ni ĉiuj faris ĉion eblan. Mi bone scias, ke la komuna travivaĵo plifortigis nian interkomprenon kaj pliiĝis nian avidecon rapide forigi la malfeliĉon. Mi ja spertis, kion signifas dividi malfeliĉon, kaj komprenas, ke nur reciproka respekto kaj honesteco kondukas al vera sincereco.”

Tie mi informiĝis pri iuj interesaj historioj. Juna paro malkaŝis al siaj familiestroj la sekreton de sia amafero post ĝia sukceso. La patro de la junulo estis vidvo, dum la patrino de la knabino vidvino. La du maljunuloj estis kontentaj pri la gefianĉiĝo de la juna paro. Ankaŭ ili mem pli kaj pli ofte kontaktiĝis. Post interkompreniĝo dum certa tempo ambaŭ paroj decidis festi sian geedziĝon en la sama tago. Estis ankoraŭ alia maljuna paro. La viro estis Tjan Fengnjan kaj la virino Ŭang Joŭting. Svatite de siaj gefiloj aŭ bogefiloj, ankaŭ ili geedziĝis kaj kunvivas feliĉe.

Respondeculo de la urba virina federacio diris al mi, ke nemalmultaj virinoj reedziniĝis kunportante sian antaŭan bopatrino kaj nemalmultaj viroj reedziĝis, ne forlasinte siajn antaŭajn bogepatrojn. Iuj vidvinoj, kiuj perdis sian edzon jam antaŭ pluraj jaroj, nun refoje edziniĝis, tiklate de alies feliĉa vivo. La virina federacio aprobis tian faron. Por helpi la novajn familiojn solvi konfliktojn, la virina federacio ĉiujare elektas modelajn familiojn por doni bonan ekzemplon al la aliaj.

La faktoj montris, ke ne ĉiuj novaj familioj vivas harmonie. Ĝaŭ Hemin, en loĝ-kvartalo de Hebej-strato, edziĝis al iu virino, kiu havas la saman sorton, kiel li. Ili ofte kverelis pro la infanoj, ankaŭ la infanoj kverelis inter si. Por vivi trankvile ili povis fari nenion alian ol sin separi. Post kelkaj jaroj, kiam la infanoj plenkreskis kaj edziĝis unu post alia, tiu maljuna paro komencis denove kunvivi.

U Ĝjibaŭ kaj lia duonpatrino



Simfonio de la vivo

de ĜANG ĈINGĜEN

En televidilo iu ludas pianan konĉerton. La patosa kaj profunda komponaĵo estis ĝislarme emocia. Jen komponisto Jang Ju ĵus intervjuita de mi. Prenante la katastrofan tertremon okazintan en la urbo Tangŝan kiel la temon, li verkis la konĉerton kun larmoj kaj ŝvito. La komponaĵo prenis la muzikon de ombroteatraĵo de Tangŝan kiel la fundamentajn tonojn kaj portas densan lokan koloron. La verko prezentis la firman volon de la heroa popolo de Tangŝan en restarigo de la hejmloko kaj ilian karmemoron al siaj mortintaj familianoj.

Jang Ju estas postvivanto el la tertremo. En la tertremo lia tuta familio estis subpremata de la falinta domo. Liaj edzino kaj du amindaj infanoj mortis de subpremo, kaj nur li sola estis elfosita el la rubo de preterpasantoj morte vundita. Post unujara kuracado resaniĝis lia korpo, tamen la vundo al lia koro ne estis forigebla. Dufoje li provis sin mortigi, sed estis savita de siaj amikoj kaj kolegoj. Antaŭ la tertremo li ĝuis certan famon en la artista rondo de Tangŝan per komponado de kelkaj entuziasmaj kantoj. Nun li decidis per la plumo fari utilajn aferojn por

la popolo de sia hejmloko. Per sia penetriva observo pri la vivo kaj la ĝusta elekto de la temo, Jang Ju verkis en provizora loĝejo la patosan pianan konĉerton.

La verkado de la konĉerto estis korŝira kaj doloriga. Ofte ekstremis lia skribanta mano, kiam li rememoris la tragikan morton de siaj familianoj. Jang Ju mem ne povis memori, kiom li larmis dum li verkis tiun konĉerton. Homoj, ne spertintaj la malĝojegon, ne povas kompreni lian internan senton. Eble pro la malfacileco de la vivo, jam tute griziĝis la hararo de tiu ĉi kom-



Ĝang Dagŭang
intervjuata

Jang Ju (la unua
le maldekstre)
kaj liaj edzino
kaj filo



ponisto de malpli ol 40 jaroj. La verkaĵo ne nur prezentis malĝojon, sed ankaŭ vidigis, ke la firmaj tangŝan-anoj antaŭeniras paŝon post paŝo kun vundoj, kunpremante la dentojn kaj klinante la kapon. Tiu ĉi koncerto prezentis ankaŭ lian profundan doloron pro la perdo de liaj familianoj kaj samlokanoj, kaj lian sinceran amon al la nuna edzino.

Ŝjaŭ Mu, la nuna edzino de Jang Ju, estas aktorino de pekina opero. Ŝi subtenas lin en strebado de verkado per sia pura amo. Antaŭ 6 jaroj naskiĝis ilia filo, kiu portis ĝojon al tiuj du samsortuloj.

Por la 10-a datreveno de la tertremo, Jang Ju okupas sin per komponado de simfonia ĥoro "Tangŝan, Fenikso Renaskiĝinta el Fajro".

Eble la kripluloj povas montri pli koncentre firman volon de la popolo de Tangŝan. La katastrofo kripligis 3 000 tieajn loĝantojn. La magistrato kaj ĉiuj fa-

brikoj kaj minejoj de Tangŝan respektive fondis sian sanatorion por kripluloj kaj paralizuloj. Kun peza koro mi veturis al la sanatorio de kripluloj kaj paralizuloj fondita de la magistrato, timante vidi la kriplulojn suferintajn de giganta malfeliĉo en la mondo. Sed veninte inter ilin mi tuj estis infektita de ilia bona aspiro al la vivo kaj malaperis mia timo. Iuj el ili legis librojn aŭ ĵurnalojn, aliaj ludis ŝakojn aŭ pokeron, triaj trikis vestojn aŭ plektis korbojn, kvaraj riparitis televidilojn kaj la kvinaj faris korpoekzercadon sur speciale farita paralelo. Eble pro la tempopaso, jam ne videblis malĝojo kaj ĉagreno sur ilia vizaĝo.

Tie mi konatiĝis kun Ĝang Dagŭang, kripliĝinta en tertremo, ĝuste en ŝia ora juneco de 20 jaroj. Ŝiaj gepatroj estas intelektuloj kaj instruis ŝin de ŝia infaneco ami la vivon, ami lerni kaj strebi al pli da scioj kaj vero. Trafite de tiel grava katastrofo, ŝi tamen ne deprimiĝis kaj deci-

dis iri la vojon de literatura verkado por servi al la socio per siaj cerbo kaj manoj. La publikiĝo de ŝia unua verko "Aspiro de la Nubo" en la "Labora Ĵurnalo de Tangŝan" stimulis ŝin al pli diligenta studo kaj verkado en plejparto de ĉiutaga tempo. Jam publikiĝis en ĵurnaloj ŝiaj dekkelkaj prozoj kaj poemoj, ekz. "Stellumo", "Herbeto Dankas Favoron de Printempo" k. a.

Same kiel aliaj pli ol 100 kriplaj kamaradoj, la vivtenado kaj kuracado estas pagitaj tute de la ŝtato. Ŝi diris al mi: "Nia aflikto estas pli peza ol tiu de sanuloj. Mi, 30-jara, estas kaj memrespekta kaj pesimisma pri mia edzeco. Mi bezonas kompencon de aliuloj, tamen estas malfacile trovi intimumon. Mi estas zorgata de amikoj, kuracistoj kaj flegistinoj, tamen iam mi ankoraŭ sentis solecon kaj ĉagrenon."

Alia junulo Fu Pingŝeng estas nur 27-jara kaj estas same senkomplete kuŝigata en la lito pro la vundiĝo. La tertremo forrabis



*Fu Pingŝeng
(dekstre), estro
de la arta grupo
de kripluloj*

la vivon de ĉiuj liaj familianoj. Pro tio li ploris kaj eĉ volis sin mortigi. Sed nun li ĝoje vivas kaj lertas en muzikludo kaj kantado. Subtenate de la gvidantoj de la sanatorio, li organizis artan grupon de kripluloj. Ili turneis en iuj urboj kaj intervidiĝis kun amikoj el diversaj lokoj de la mondo. Mi iam televidis lian kantadon. Liaj kantoj estas plenaj de amo al la vivo kaj aspiro al la bela estonteco.

Fakte nur malmultaj kripluloj vivas en la sanatorioj, dum pli multaj en sia hejmo kaj estas flegetaj de siaj familianoj. Iuj geedziĝis por interhelpi unu la alian. Song Najŝjūan estas kriplulo de supera paraplegio. Li edziĝis kaj fondis komercan kompanion de kripluloj. Liaj faroj profunde emociis min. Enirinte lian domon mi estis forte interesita. Lia lito povas libere moviĝi en kaj el liaj ĉambroj kaj oficejoj. En la centro de lia ĉambro, kun areo de 15 kvadrataj metroj, estas lito. Sidante sur la lito, lia edzino povas fermi kaj malfermi la por-

don per premo al la ĉe-lita ŝaltilo. La muroj ambaŭflanke de la lito estas kovritaj per kelke da tabuloj. De ekstere oni ne povas trovi ĝian sekreton. Fakte la tabuloj estis moveblaj, post flankentirado de ili aperis kuirejo, konservejo kaj tualetejo. Sidante sur la lito ili povis funkciigi ĉion. Mi laŭdis, ke ili estas talentaj. Ŝjaŭ Song sin ĝenis diri: "La vivo devigis nin fari ĉion."

En kelk-hora interparolado, ili verŝis al mi siajn ĝojon kaj malĝojon, precipe la zigzagajn spertaĵojn pro sia geedziĝo. Song Najŝjūan kaj lia edzino Sun Cujing interkonatiĝis kaj enamiĝis, kiam ili estis kuracataj aliloke. Song kompatis Sun, kiu fariĝis sola post la morto de la gepatroj en la tertremo. Ankaŭ Sun ŝatis Song pro tio, ke li estas junulo pensema, saĝa kaj lernema. Post reveno al Tangŝan, ili decidis kunvivi. Sed iliaj parencoj kaj amikoj firme oponis ilian decidon, misopiniantes, ke ili ne povos interhelpi. Eĉ koncernaj institucioj ne sankciis al ili la geedzi-

ĝon. Pro tio, veturante sur radseĝo Song Najŝjūan vizitis multajn rilatajn instituciojn por peti la permeson al la geedziĝo kaj finfine ricevis la geedziĝan akton. Post nelonge, ili konstruis la kabanon, kolektis monon kaj fondis vendejon de infanaj vestoj kaj komercan kompanion de kripluloj. Estas facile imageble, kiel grandajn malfacilojn ili renkontis. Song Najŝjūan ofte diris: "Mi tion faris pro tio, ke mi ne volas min kateni en la lito kaj radseĝo, mi havas cerbon sanan kiel aliaj kaj volas min vivteni per mia propra forto kaj kontribui al miaj samsortuloj."



Vojo de Bakin, vojo de esperantisto



Bakin

Por peti opiniojn de fama ĉina verkisto Bakin, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, pri la baldaŭ okazonta 71-a UK, nia redakcio sendis min al Ŝanhajo en la lasta februaro. Mi tuj aŭdis atinginte la urbon, ke la 82-jara Bakin fartas ne bone kaj parolas kun malfacilo. Li jam anoncis en ĵurnalo, ke li akceptos neniun ĵurnaliston por kviete verki. Mi petis la prezidanton de la Ŝanhaja Verkista Asocio, ke li transdiru mian intencojn, kaj fine mi akiris la permeson.

La domo de Bakin, malnovtipa, du-etaĝa, kun groptegmento, sidas en kvieta malgranda strato. Mi venis tien en la tempo interkonsentita, kaj la filino de Bakin afable kondukis min en la domon. Pro la supra kaŭzo mi estis maltrankvila pro necerteco pri la sukceso de mia intervjuo. Sed, kiam mi eksidis apud la blankhara kaj aplomba

verkisto, mia timo tuj malaperis. Li parolis ne tiel malfacile, kiel oni diris, sed iom rapide. Li estis viglapensa. Plurfoje li interrompis miajn vortojn por korekti miajn malĝustaĵojn. Sendube, tiu ĉina literatura majstro kaj respekta esperantisto estas sentema.

Mi ekmemoris la notojn faritajn de li post lia vizito al Nagasko kaj Hiroŝimo en 1980: "Mi legas la gravuritajn vortojn sur la monumento: 'Mi ege soifis, mi iris serĉi akvon. Sur la akvo estis io simila al oleo. . . Mi tre volis akvon kaj trinkis ĝin kune kun la oleo.' Jen vortoj de 9-jara knabino. La Paca Fonto estis starigita por memori pri la viktimoj, kiuj mortis trinkante. . . Ĉirkaŭ mi kvazaŭ eksonis multaj voĉoj: 'Akvon, akvon, akvon al mi!' Ankaŭ mi soifis. Estas multaj basenoj ĉirkaŭe. Se mi estus tie en aŭgusto 1945, mi certe klinus min por trinki."

Tiu bonkora kaj sentema homo verkis multajn romanojn kaj eseojn, kiuj estis kolektitaj en «Verkaron de Bakin» en 14 volumoj. Plejparto de liaj verkoj montris lian profundan simpatian al la suferoplenaj popolanoj kaj lian kondamnon al la malnova socio.

El liaj romanoj plej plaĉas al mi «La Familio», kiu priskribas, kiel iom post iom dekadencis granda prospera feŭda familio en Ĉinio en la komenco de la 20-a jarcento, kiam falis la feŭda dinastio, tamen interbataladis militaristoj kaj devastiĝis diversaj ismoj. La romano estas fama ĉefverko de Bakin. Ĝi aperis en 1931, kaj estis 33-foje represita ĝis 1951. Ĝin oni filmis en la 50-aj jaroj kaj nun telesendas tra Ĉinio. Tiu majstroverko sendube famiĝos tra generacioj.

Tamen Bakin ne rekonas sin literaturisto. Li diris: "Mi ne estas literaturisto. Mi komencis verki romanojn por serĉi eliron."

Por serĉi eliron, li amikiĝis ne nur kun literatura verkado, sed ankaŭ kun Esperanto.



La franca prezidanto F. Mitterrand (la unua de dekstre) donas al Bakin francan honoran ordenon.



Prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco s-ino Deng Jingĉaŭ (maldekstre) kaj Bakin

Origine li nomiĝis Li Jaŭtang. En 1904 li naskiĝis en granda familio de burokrato-bienulo en Siĉŭan-provinco. Jam en la infaneco li vidis en la familio la suferadon de la geservistoj, la resignacion de la gefratoj kaj la malicon, orgojlon, hipokritecon kaj degeneron de la onkloj. Dume lia bonkora patrino ofte edukis lin kiel kompati kaj amzorgi ĉiujn. Ĉio tio multe ĉagrenis Bakin, kiu kreskis iom post iom kaj sentis sin vivanta en “kaĝo”.

Baldaŭ eksplodis la Movado de la 4-a de Majo fame konata en la ĉina historio. Rapide disvastiĝis la progresemaĵoj «Nova Junularo», «Semajna Revuo», «Nova Tajdo» k.a., kiuj propagandis novan kulturon. La 15-jara Bakin kaj lia frato legis ilin kun granda intereso.

La artikoloj havis komunecon — kritiki la tiaman feŭdan socion. Sed kia devas esti la nova socio? Estis malsamaj asertoj. Oni prezentis diversajn nacisavajn doktrinojn, el kiuj anarkiismo plej influis lin kaj fariĝis lia kredo. Bakin diris, ke Zamenhof estis konigita siatempe al ĉinaj intelektuloj kiel anarkiisto. Bakin eklernis Esperanton en 1921, post kiam li legis artikolon sub la Esperanta rubriko de iu anarkiisma gazeto.

Kredo havigis al Bakin esperon kaj celon de vivo. Inspirite de la devizo de la franca revoluciisto G. J. Danton, “Kuraĝu, kuraĝu, ĉiam kuraĝu”, li kaj aliaj junuloj fondis progreseman periodaĵon kaj publikigis en “Shishi Xinbao” (Nova Ĵurnalo de Aktualajoj) novajn poemojn, kiel «La Ploro de Ofendito», «Okazaĵo Survoje», «Songŝo», «Frenezulo», «Honto» kaj «Infano sen Hejmo». Ne povante elteni la vivon de la feŭda familio, li forlasis ĝin en 1923 kaj neniam revenis.

En 1924 kaj 1925 li lernis en Nankino. Li per poŝto aĉetis Esperantajn librojn de la Ŝanhaja Esperanto-Librejo, inter kiuj estis Fundamenta Krestomatio de Zamenhof kaj liaj aliaj tradukoj. Post la lecionoj li lernis mem Esperanton.

Ĝuste en tiu tempo okazis en Ŝanhajo la masakro de la 30-a de majo farita de imperiistoj kontraŭ laboristoj kaj manifestaciantoj. La okazaĵo forte ekscitis Bakin, kiu eskapis el la kateno de la feŭda familio kaj esperis lumon en la mondo. Li diris: “Nia kredo estas forigi la dion kaj la mastrojn, por ke ĉiuj en la mondo akiru liberecon,” sed kiel plene efektiviĝi la celon? Por serĉi plu eliron por si kaj la veron emancipi la popolon kaj ankaŭ sin mem, li vojaĝis al Francio januare de 1927 por studi.

En ĉirkaŭ du jaroj en Francio Bakin legis multajn verkojn de francaj revoluciistoj kaj kontaktiĝis kun polaj, italaj kaj hispanaj revoluciuloj. En tiu tempo okazis du aferoj. Unu en Ŝanhajo: je la 12-a de aprilo 1927 kuomintangaj dekstruloj amasbuĉis progresemaĵojn kaj laboristojn kaj iuj ĉefanarkiistoj eĉ staris ĉe la flanko de la buĉistoj. La alia en la tiel nomata demokratia Usono: du italaj laboristoj estis misakuzitaj kaj kondamnitaj al morto. Kontraŭ tio laboristoj kaj personoj de

diversaj soci-tavoloj de Francio ĉiutage mitingis por protesti. Bakin skribis al unu el ili, kaj ĉi tiu sendis al li paketon da libroj kaj longan leteron kun espero, ke li “honeste vivos, amos kaj helpos aliajn”. La 22-an de aŭgusto 1927 la du laboristoj estis ekzekutitaj. Kirliĝis en lia cerbo doloro, indigno kaj nostalgio kaj instigis lin al verkado de «Pereo», lia unua romano priskribanta lian amon kaj malamon. La verko malkaŝis la malluman socion de Ĉinio kaj distrumpetis la revolucion. Ĝi aperis serie en sinsekvaj numeroj de la plej influa ĉina gazeto «Xiaoshuo Yuebao» kaj trovis multajn legantojn. Kaj post serĉado Bakin trovis rimedon defendi justecon kaj kondamni krimagojn kaj suriris la vojon de literatura verkado.


Krom la literatura verkado, Bakin okupiĝis ankaŭ pri tradukado de literaturaĵoj, inter kiuj estis liaj elesperantigitaj itala unuakta dramo «La Floro de l' Pasinto» de E. Amicis, sovetia dramo «La Morto de Danton» de A. N. Tolstoj, japana unuakta dramo «Danco de Skeletoj» de Akita Ujaku kaj hungara mallonga romano «Printempo en la Aŭtuno» de J. Baghy.

Esperanto havis rilaton eĉ kun la literatura verkado de Bakin, kiu skribis en sia antaŭparolo por la Esperanta eldono de «Aŭtuno en la Printempo»: “La ideo titoli mian mallongan romanon verkitan en 1932 per «Aŭtuno en la Printempo» venis en mian kapon ĝuste post fintraduko de la romano de J. Baghy. Mi eĉ verkis por ĝi antaŭparolon imitante lian tonon. Tio montras la influon

de lia verko al mi en tiu periodo. Mi dankas lin, kaj mi dankas Esperanton.”

Bakin neniam ĉesis verki dum jardekoj, eĉ kiam la nacio estis sklavigita kaj li vagis de loko al loko. Rememorante sian malfacilan verkistan vivon, li skribis: “Dum mia verkado de «Ĝardeno de Ripozo» (mallonga romano verkita en 1944 kaj priskribanta la neeviteblan dekadencan de la feŭda bienula familio — *La Red.*) mi tenis en mia teko tuĉon, penikon kaj multe da papero. Mi venis al iu loko kaj pruntis telereton kiel inkujon. Mi verŝis gutojn da akvo en la telereton kaj fro-

Bakin (dekstre) en kongreso de literaturistoj kaj artistoj



Bakin (la dua de maldekstre) akiris honoran doktorecon de universitato en Hongkong

tis la tuĉon, antaŭ ol verki. Iunokte, kiam mi estis skribanta la lastajn vortojn de «Ĝardeno de Ripozo» en gastejo de Bejbej en Ĉongĉing, estingiĝis la lampo. Mi trovis pecon da kandelo kaj ĝin ekbruligis. Mi ankoraŭ ne finis la laboron, la kandelo jam forkonsumiĝis. Mi deziregis plian pecon da kandelo por daŭrigi la skribadon.”

Bakin tiel diligente laboris kaj esploris la homan vivon, elverŝante al la popolo sian koron. Inter la sennombraj voĉoj de la ĉina moderna literaturo li ludis adaĝon softan kaj melankolian, tamen ĉarman kaj stimulan. Mi petis lian opinion pri lia verkado. Li diris: “Iuj juĝis, ke miaj verkoj manifestas anarkiismon, humanismon kaj patriotismon, sed mi verkis ne por ia doktrino. En la verkado mi trovis multajn kontraŭdirojn nesolveblaj. Mi serĉis en la verkado eliron por solvi la kontraŭdirojn.”

“Kia do estas la plej granda kontraŭdiro?” demandis mi. Li respondis: “Mankas vojo inter la idealo kaj realo. Ekzemple anarkiismo, kiun mi pensas iom vanta, ne povas efektiviĝi sian idealon.”

“Kaj Esperanto? Kiel vi opinias pri ĝi?” “Mi amas tiun lingvon. En 1928 mi redaktis «La Ver-

dan Lumon», la organon de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. En 1937 la asocio detruigiĝis de japanaj kanonoj kaj mi forlasis la Esperanto-movadon. Tamen mi estis ĉiam simpatia al tiu lingvo. Nun en la internacia komunikado ankoraŭ ekzistas problemoj de lingvo-baro. Esperanto ne povas anstataŭi la naciajn lingvojn, sed povas ludi helpan rolon.”

Koncerne la 71-an UK, Bakin demandis min pri ĝia prepara laboro. Li diris: “La kongreso estas grava afero por la ĉinaj esperantistoj. Mi esperas, ke ĝi plene sukcesos. Ĝia sukceso forte influos la ĉinan esperantistaron.”

Finiĝis la intervjuo. Bakin insiste akompanis min ĝis la pordo. Li menciis la 65-an UK, kiun li ĉeestis. Mi memoras lian impreson pri la kongreso: “En la kongresejo mi sentis min kvazaŭ en harmonia familio. Kiel bone estos, se la mondo fariĝos kiel la kongresejo!”

Mi adiaŭis la eminentan fekundan verkiston, maljunulon multe respektatan de sennombraj legantoj. Mi eliris el la pordo, remaĉis liajn vortojn kaj ekpensis pri la bela idealo de la esperantistoj. Mi kvazaŭ vidis longan vojon. Jen vojo de Bakin, vojo de esperantisto.

TIBOR SEKELJ:

Unesko firme subtenas Esperanton

Dum sia 23-a sesio de la Ĝenerala Konferenco Unesko adoptis rezolucion favore al Esperanto. La rezoluciproponon prezentis la jugoslava delegitaro kune kun ses kunsubskribantoj, tiuj de Ĉinio, Bulgario, Hungario, Kostariko, Pollando kaj Sanmarino.

Kiel reprezentanto de UEA en tiu Konferenco, okazinta en Sofio, de la 8-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1985, mi kontaktis multajn reprezentantojn kaj informadis ilin pri Esperanto, ĝia nuna stato de progreso kaj

ĝia konstanta kaj multflanka kunlaboro kun Unesko. Aliflanke multaj esperantistoj diverslandaj direktis sin al sialanda edukministerio aŭ Unesko-komisiono por informi ilin kaj peti apogon al nia rezolucipropono. Informon pri tia agado mi ricevis de s-anoj Corsetti/Italio, Y. Isobe/Japanio, T. Vasko/Hungario/, S. Prasad Mitra/Hindio/, Maitzen/Aŭstrio/, R. Harry/Aŭstralio/, Randriena-kena/Madagaskaro/M. M. Ngingi/Kongo/, P. Todorov/Bulgario/, J. M. Mbele/Kameruno/, kun plua kontribuo de d-rino Despiney kaj

A. Staes, kaj certe multaj aliaj, kiuj ne anoncis al mi. Tia vasta kunlaboro montras vastan celkonscian agadon, kies efiko ne povas ne montriĝi.

Mi havis la okazon dufoje paroladi, la unuan fojon en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco, kaj la duan fojon en la Komisiono IV, en kiu nia rezolucipropono DR 218 estis diskutota. Dum tiu kunsido favore al Esperanto parolis ankaŭ la reprezentantoj de Jugoslavio, de Japanio kaj de Eurbordo, kies reprezentanto diris ke lia lando

La ĝenerala direktoro de Unesko s-ro Amadou Mahtar Mbou (maldekstre) afable akceptas s-ron Tibor Sekelj, senditon de UEA.



varme bonvenigas la Universalan Kongreson de esperantistoj en 1990, kaj ke li esperas ke tiu evento grave kontribuos al la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Interesaj kaj grandvaloraj estis miaj kontaktoj kun membroj de la delegitaroj el Sanmarino, Kostariko, Ĉinio, Hindio, Aŭstralio kaj multaj aliaj, inkluzive tutan vicon de afrikaj landoj, inter kiuj mi distribuis informajn broŝurojn pri la lingva problemo en Afriko kaj la lingva problemo de la movado de nealiancaj landoj. Laŭ mia peto, la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar Mbou akceptis min por persona interparolo. Tiuokaze mi donacis al li mikrolibron/15 × 15 mm/, en kiu mi kompilis la vorton "paco" en 100 lingvoj. La titolo de la libreto estas en Esperanto: "PACO".

Laŭ mia opinio, eĉ se la rezolucio ne estus adoptita, la tempo kaj energio, kiun mi investis, ne estis senutilaj. Sed feliĉe, la rezolucio estas akceptita ĉiuvoĉe, sen kontraŭdiro, kaj jen ĝia teksto:

Celebrado de la centjariĝo de la kreado de Esperanto

La Ĝenerala konferenco,

Konsiderante ke dum sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, ĝi per sia rezolucio IV. 1.4.422-4224, notas la rezultojn atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internacia intelekta interŝanĝo kaj de reciproka interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas ke tiuj koincidas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante ke Esperanto ekde tiam multe progresis kiel ilo de interkompreniĝo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plimulto de regionoj de la mondo kaj la plej multaj homaj aktivadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn kiujn prezentas Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsama nacieco,

Notante la tre grandan kontribuon de la Esperanta movado, kaj precipe de la Universala Esperanto-Asocio, en la diskoniga-

do de informoj pri la aktivado de Unesko, samkiel ĝia partopreno en tiu aktivado,

Konscia pri la fakto ke en 1987 Esperanto festas sian centjariĝon de ekzisto,

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon je ĝia centjariĝo,

2. **Petas** la ĝeneralan direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel ilo por pli bona interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj,

3. **Invitas** la Ŝtatojn Membrojn signi la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldonoj de specialaj poŝtmarkoj ktp., kaj iniciatu la enkondukon de studprogramo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institutoj de supera lernado.

4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon uzi Esperanton kiel ilon por la diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive informojn pri la laboro de Unesko.

Ĉerivera urbo Uhan


de LI ĈJANG

Uhan, situanta sur la fekunda Ĝjanĝhan-ebenaĵo, estas granda urbo kun ĉarmaj pejzaĝoj. Jangzi-rivero tratorentas la urbocentron. Sude kaj norde de la rivero imponas la verdaj Testuda kaj Serpenta Montoj. Hanŝuj-rivero el nordokcidento kunfluas tie kun Jangzi-rivero. La riveroj dividis la urbon en tri partojn, Uĉang, Hankoŭ kaj Hanĵang.

La urbo havas longan historion. Jam antaŭ pli ol 3 000 jaroj tie estis disvolvita kulturo. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) en Hanĵang ĉe la norda bordo de Jangzi-rivero oni konstruis fortreson. En la tria jarcento Sun Ĉĵuan, la reĝo de U-regno, garnizonigis siajn soldatojn kaj konstruis urbomuron en Uĉang sur la suda bordo de la rivero. Hankoŭ

kaj Hanĵang origine kunligiĝis. Sed en Ming-dinastio (1368 — 1644 p.K.) Hanŝuj-rivero ŝanĝis sian fluejon kaj apartigis ilin. Siatempe Hankoŭ estis prospera kaj fariĝis unu el la kvar famaj urboj en Ĉinio. Nun Hankoŭ, Hanĵang kaj Uĉang estas kunligitaj per la Uhan-a Ponto super Jangzi-rivero kaj la Hanŝuj-a Ponto. Uhan estas ilia komuna

En Uhan



nomo kaj la ĉefurbo de Hubej-provinco.

Turistoj tre ŝatas aprezi la vastan kaj torentan akvon kaj ĉarman pejzaĝon ĉe la bordo de Jangzi kaj promeni sur la unua ŝtala ŝose-fervoja ponto super Jangzi, kiu longas 1 600 m. kaj altas 80 m. super la akvo, kaj kiu kiel ĉielarko kunligas la Testudan kaj Serpentan Montojn. La fama turo Hŭanghe sur la Testuda Monto kaj TV-turo sur la Serpenta Monto rigardas unu al la alia. Diversaj ŝipoj veturas navete sur la rivero. Sur ambaŭ bordoj alte staras domegoj, el kiuj la plej okulfrapa estas la hotelo Ĉingĉŭan 24-etaĝa, kun alteco de 88 metroj. Ĝi estas moderne ekipita. Ĝi situas ĉe la norda piedo de la Testuda Monto, rigardas orienten al Jangzi-rivero kaj najbaras kun la vidinda loko Ĉingĉŭan. Ĝi estas ideala hotelo por turistoj.

La turo Hŭanghe, konstruita laŭdire en 223 a. K., en la Periodo de la Tri Regnoj, estas unu el la tri famaj turoj en suda Ĉinio. Ĝin vizitis multaj famaj kleruloj kaj poetoj, kiuj verkis belajn poemojn kaj artikolojn pri ĝi. Sed bedaŭrinde, la turo plurfoje forbrulis post sia konstruado kaj rekonstruado. Oktobre de 1981 oni rekonstruis la turon sur la supro de la Serpenta Monto unu kilometron for de ĝia ruino, imite laŭ tiu konstruita en Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.). La turo estas kvin-etaĝa en antikva stilo. Apud ĝi oni konstruis blankan pagodon, stelean galerion, portalon k.a. Nun tie jam formiĝis antikveca konstruaĵaro, kiu altiras multajn turistojn.

Ĉe la okcidenta piedo de la Testuda Monto en Hanjang estas ĝardeno nomata la Teraso de Sepkorda Liuto. Estas legendo pri la teraso. En la Periodo



La nova turisma loko Hehŭating

de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) la fama liut-ludanto Ju Boja de Ĉu-regno ludis liuton sur ŝipo ĉe la montpiedo. Estis preterpasanta lignohakisto Ĝong Zi-Ĉji, kiu ne volis foriri, aŭdinte la muzikon. Babilante, Ju Boja trovis, ke Ĝong bone komprenas lian muzikon. Kaj tiel ili fariĝis intimaj amikoj. Poste Ĝong mortis pro malsano. Ju Boja korŝiriĝis pro perdo de sia amiko kaj ĵet-rompis la liuton. Li decidis ne plu ludi. La legendo vaste cirkulas en Ĉinio. Por memori pri ili, oni konstruis la terason, laŭdire, en la kvina jarcento. La teraso najbaras norde al la Luna

Lago kaj okcidente rigardas al Mejzi-monto, kaj la konstruaĵoj vidiĝas en verdaĵo — tre bela pejzaĝo.

La budhisma templo Gujĵŭan en Hanjang estis konstruita en la fino de Ming-dinastio kaj la komenco de Ĉing-dinastio. Kun historio de pli ol 300 jaroj, ĝi estas unu el la grandaj budhismaj temploj en Hubej. Ĝiaj haloj estas belaj kaj plenaj de nacia gusto. La 500 argilaj arhat-statuoj en la Arhata Halo havas mienojn ĝojan, koleran kaj malĝojan. En la Sutra Halo estas konservataj multaj valoraj sutroj, budho-statuoj kaj steleoj. Nun la templo

administrata de bonzoj ĉiutage akceptas grandan nombron da pilgrimantoj kaj turistoj.

La pitoreskejo de la Orienta Lago en la orienta antaŭurbo de Uhan kovras areon de 87 kvadrataj km., el kiuj 33 kvadrataj km. estas akvo. La lago estas klara, kun zigzagaj bordoj. Per sia aparta ĉarmo ĝi allogas multajn turistojn. Ĝi estas ankaŭ ideala loko por surakvaj sportoj. La verdaj montoj Moŝan kaj Lŭoĝja alte staras apud la suda bordo de la lago. En la tuta pitoreskejo prosperas arboj kaj floroj kaj pompas diversformaj pavilonoj, kioskoj kaj turoj. Lastatempe oni faris artismajn konstruaĵojn kiuj plibeligis la pitoreskejon.

Estas vizitinda la Muzeo de Hubej-provinco en la pitoreskejo. Tie oni eksponas gamo-sonorilaron kaj aliajn valorajn objektojn elfositajn en 1978 el la tombo de markizo Ji de Zeng. La tombo ekzistis jam pli ol 2 400 jarojn.

Krom kune entombigitaj homoj kaj hundoj estis elfositaj ankaŭ muzikiloj, bronza ceremoniata objekto, armiloj, oraĵoj, jadaĵoj, bambuaj objektoj kaj bambuaj slipoj, sume pli ol 7 000 pecoj. El ili la plej atentigaj estas 124 antikvaj instrumentoj, kiel bronza gamo-sonorilaro, ŝtonplata gamo-sonorilaro, tamburo, se (speco de kordinstrumento), sep-korda liuto, ŝeng (speco de blovinstrumento), flaĝoletaro kaj bambua fluto. La eltrovo de tiel multspecaj, grandnombraj, delikate faritaj kaj bone konservitaj muzik-instrumentoj estas malofta en la ĉina arkeologia historio.

La plej okulfrapa estas 64-peca gamo-sonorilaro. Ĝi pendis en tri vicoj sur la framo, ĝis oni elterigis ĝin. La plej granda sonorilo altas 153.4 cm. kaj pezas 203.6 kg. Ĝi estas la plej granda el la ĝis nun elfositaj sonoriloj. La framo farita el ligno kaj bronzo, estas sufiĉe fortika. Sub la pezo

de pli ol 2 500 kg; ĝi eltenis la 2400-jaran provon. Post esploro fakuloj diris, ke la gamo-sonorilaro povas produkti norman sonon, se oni frapas ĝin en difinita loko. Per tiu gamo-sonorilaro oni povas ludi antikvajn kaj modernajn, ĉinajn kaj eksterlandajn muzikojn kun vasta diapazono kaj bela tembro.

Hubej estas konata kiel provinco de mil lagoj. Tie oni lertas en preparado de pladoj el dolĉakvaj fiŝoj kaj sovaĝaj bestoj aŭ birdoj. La bramo de Uĉang (*Megabrama amblycephala*) estas tre bongusta. Preskaŭ ĉiuj turistoj al Uhan volas ĝin gustumi. Uhan produktas ankaŭ orajn kaj arĝentajn ornamaĵojn, ĉinstilajn pentraĵojn en antikva gusto, plumventumilojn de Honghu, kolorajn fajencaĵojn de Jiĉang kaj antikvecajn lakaĵojn de Ĝjangling kaj konko-skulptaĵojn. Ĉiuj tiuj estas idealaj memoraĵoj por turistoj.

Ĉingĉuan-hotelo en malproksimo





Hüanghe-turo êe la rivero

La Teraso de Sepkorda Liuto






Mošan-monto en aũtuno



En la templo Gujjũan




Bongusta bramo de Učang



Turistoj ĉe Hŭanghe-turo



La pitoreska Orienta Lago



La kulturo de la antikva Djan-regno

Fotoj de ZOŬ JONGĈJONG

*Bronza ornamaĵo
kun teler-dancantoj*

Orita bronza ornamaĵo



Bronza kapkuseno



La bronza kulturo de Ŝang-dinastio (de la 16-a ĝis la 11-a jc. a. K.) estas honorita kiel fiĝo de la ĉina nacio, tamen oni malmulte konas la bronzan kulturon en la sudokcidenta landlima regiono de Ĉinio. Ĉinaj historiaj literaturoj montris, ke estis la sklavo-sistema regno Djan en la nuna Junnan-provinco en la komenco de la 3-a jc. a. K. La regno senbrue retiriĝis el la historia areno en batalo en la 1-a jc. a. K., samtempe kun tio malaperis ankaŭ ĝia prospera bronza kulturo. Pasis dumil jaroj. Oni neniel povis trovi respondojn el tre malmultaj historiaj materialoj pri ĝiaj socistato, politiko, ekonomio, kulturo kaj moroj. Depost la 50-aj jaroj ĉinaj arkeologoj prifosis tombojn de la antikva Djan-regno en Ŝiĝaj-monto de

Ĝining, Liĝja-monto de Ŭang-ĉuan, Tajĝji-monto de Anning kaj Ŭangĝjaba de Ĉuŝjong en Junnan-provinco kaj elterigis grandan kvanton da historiaj objektoj. Ili kovris la mankon en la skribo-lingva historio.

Unu el ĝiaj gravaj historiaj objektoj estas "Djan-reĝa sigelilo" farita el oro kun fajneco de 95%. Ĝi montris la politikajn rilatojn inter la antikva Djan-regno kaj la Okcidenta Han-imperio (206 a. K. — 8 p. K.). En la ĉina historia verko "Historia Kroniko" estas notite, ke en 109 a.K. imperiestro Udi de la Okcidenta Han-dinastio donacis reĝan sigelilon al la reĝo de Djan. La "Djan-reĝa sigelilo" pruvis, ke la regiono Ĝining de Junnan siatempe apartenis al la regno kaj

Junnan estis teritorio de Han-imperio dum ĝia regado.


El la prifositaj tombegoj oni trovis grandan kvanton da porvivaj kaj produktaj iloj, poroferaj vazoj, muzikiloj, armiloj, buton-ornaĵoj, vitraj, jadaj kaj turkisaj belaĵoj kaj markonkoj (konkmono). Tio montris, ke la entombigoj antaŭ la morto estis posedantoj de riĉaĵoj. Iliaj tomboj estas en drasta kontrasto kun tiuj malgrandaj de ordinaraĵoj popolanoj.

La verko "Historia Kroniko" montris ke en la periodo de la 8-a ĝis la 1-a jc. a. K. Kunmingento kaj ĉirkaŭaj gentoj en tiu regiono estis gentoj el anoj kun harplekto, dum djan-gento estis gento el anoj kun hartubero. Estis forta antagonismo inter ili

Konkujo kun sceno de kulta aktivado



Bronza konkujo





*Bronza ornamaĵo
kun bovoj kaj
tigro*

dum longdaŭra tempo. La sklavaj figuroj sur bronzaĵoj de Djan-regno apartenis ĉefe al la gento el homoj kun du harplektoj surkape.

Iu bronza vazo prezentas bildon, ke du militistoj de Djan-regno revenas post venko, kun kapo de Kunming-genta viro en mano. La edzinoj kaj gefiloj de la mortigitoj fariĝis sklavoj kaj iliaj brutoj — militakiraĵoj. La bildo montris, ke la tiamaj sklavoj ĉefe estis militkaptitoj. Multaj bronzaĵoj surhavas gravuritajn bildojn pri buĉado de sklavoj por kulto. El tio vidiĝas la tiam furora barbara moro.

Alia bronza vazo prezentas riton de printempa semado: Kvar Djan-gentaj sklavoposedantinoj kun hartubero surkape en formo de arĝenta ingoto paradis en kvar palankenoj portataj respektive de kvar viroj. Antaŭ kaj post ĉiu palankeno estis vicoj da geviroj kun ŝpato kaj plugilo surŝultre kaj grenaj semoj surkape. Tio estis rito de religia kulto pri terkulturo. Alia bronza vazo prezentas religian riton de generado. La djan-oj opiniis, ke la grenplantoj kiel homoj devas trapasi koncipadon, naskon kaj kreskon. Tial ili ĉiujare okazigis

tian riton simbolantan bonvenon de aŭtuna rikolto.

La drakboata konkurso estas tradicia amuza aktivado de Taj, Baj kaj aliaj naciecoj. Multaj elterigitaj bronzaĵoj surhavas bildon pri drakboata konkurso. Tio montris, ke tiu aktivado havas longan historion.

La diversaj religiaj ritoj pri terkulturo kaj aliaj gravaj sociaj aktivadoj estis gviditaj de sklavoposedantinoj, ankaŭ virinoj estis ĉefaj laborfortoj en la produktado. Tio montris, ke Djan-regno kun terkulturo kiel la ĉefa ekonomia aktivado ankoraŭ konservis densan koloron postlasitan de la matriarka socio.

La supre diritaj grandaj agrikulturaj aktivadoj kaj granda kvanto da elterigitaj bronzaĵoj agrikulturiloj montris, ke la tiam agrikultura produktado jam atingis certan skalon.

El la bildoj sur bronzaĵoj oni povas rekoni figurojn de bestoj de 40-50 specoj, kiaj tiuj de bovo, ĉevalo, ŝafo, porko, serpento, pavo, tigro, cervo, leopardo kaj aliaj. Interalie, da bovoj kaj serpentaj figuroj estis tre multe. La bovoj okupis gravan lokon en la tiam socia ekonomio kaj estis simbolo de riĉaĵoj.

Ankaŭ la bovo estis ĉefa oferaĵo, krom sklavo, kaj ĉefa liveranto de viando por la homoj. Ankaŭ bovobatalado estis nemankigebla amuzo en la tiam vivo. Sed ne vidiĝis perbova plugado en tiel multaj bovaj aktivadoj. La serpento servis kiel adora objekto en diversaj religiaj kultaj aktivadoj.

Sur bronza peco videblis figuroj de harplektaj sklavoj katenitaj kaj jugitaj, kapfiguroj de bovo, ŝafo, ĉevalo, tigro kaj leopardo, kaj bildoj de vinujo (simbolanta vinon), korbo (simbolanta grenon), sceptro (simbolanta potencon), ŝpiniloj kaj teksiloj. Sub la bildoj estis markoj de markonkoj, cirkloj kaj mallongaj linioj, kiuj eble estis la plej primitivaj hieroglifoj de Djan-gento kaj havas gravegan valoron por esplori la devenon de skriba lingvo de la ĉina nacio. Ĉar en la skriba lingvo estis malfacile priskribi kaj prezenti okazaĵojn, movojn kaj spacajn scenojn, la realisma stilo fariĝis grava karakterizaĵo de la Djan-regna bronza kulturo, ekz., versimilaj scenoj pri milito, religia kulto, ŝpinado, teksado, tributado ktp. gravuritaj sur la kovriloj de bronzaĵoj por konservi konklumon, kaj multaj aliaj objektoj bildigantaj


paŝtadon, muzikadon kaj dancadon. Ili esprimis la socian vivon kaj morojn de la Djan-regna popolo.

La bronzaĵoj uzataj de la Djan-regnaj popolanoj por konservi markonkojn — pagilojn en komerca interŝanĝo. La eksperto montris, ke la markonkoj kun rondaj vejnoj estas devenintaj el Pacifiko kaj Hindia Oceano. El la elterigitaj objektoj arkeologoj trovis ankaŭ vitraĵojn kaj kupran skatolon portitajn de aliloke. Tio plene montris, ke la interna Junnan tiam havis ekonomian kontakton kun apudmaraj regionoj.

Granda kvanto da elterigitaj bronzaĵoj, feraĵoj, oraĵoj, arĝentaĵoj, jadaĵoj, lakaĵoj, ceramikaĵoj, ledaĵoj kaj tekstilaĵoj montris, ke ĝia metiindustrio havis jam grandan disvolviĝon. Iu bronza braka kiraso 0.1 centimetron dika surhavis vivoverajn figurojn de pli ol dek specoj de bestoj kaj insektoj, kiaj urso, leopardo, cervo, koko, porko, simio, fiŝo, lacerto, skarabo, abelo k. a. Ĝiaj muldo kaj gravurado estis faritaj delikate kaj montris altan teknikon de la regno tiuflanke.

Ankoraŭ aliaj bronzaĵoj prezentas dancadon, kiaj telera danco, pluma danco, kanta danco, fluta danco, en akompano de fluto, kupra tamburo, gamo-sonorilaro kaj gongo. Ĝis nun la nacimalplimulto de Junnan restas ankoraŭ lertaj en kantado kaj dancado.

Kupra tamburo estas historia objekto propra al la nacimalplimulto de sudokcidenta Ĉinio. La kupra tamburo trovita en Ŭangĵaba estis farita inter la 8-a kaj la 5-a jc. a. K. Ĝi estas la plej frua kupra tamburo en la mondo. Ĝi evoluis el kuirilo kaj iom post iom fariĝis rita objekto




Bovkapa ornamajo

de sklavo:posedantoj kaj nobeloj por paradi per sia riĉeco kaj potenco.

La bronza kulturo de Djan-regno atingis sian kulminon en 221 a. K. Poste la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio (221-210 a. K. sur trono) unuigis Ĉinion kaj etendis kurieran vojon ĝis Djan-regno kiu intensigis la rilatojn inter Djan kaj centra Ĉinio.

En la meza periodo de la Okcidenta Han-dinastio la imperiestro Udi ekspluatis sudokcidentan Ĉinion. Tien enkondukiĝis la progrese kulturo de Han-nacieco, tio multe akcelis la ekonomian disvolviĝon de la Junnan-a sklava socio, akcelis pereon de la sklava socio de Djan-regno kaj rezulte de tio retiriĝis Djan-regno el la historia areno.

Bronza hakilo



Paco — celo kaj espero de la homaro



La ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang parolas en la mitingo.

1986 estas la Jaro de Internacia Paco, kion UNO deklaris en 1985 en celebra soleno de sia 40-a datreveno de la fondiĝo. La temo de la jaro estas "Defendi la pacon kaj garanti la estontecon de la homaro". La decido estis aktive respondita de pli ol 100 landoj, inkl. de Ĉinio, kaj pli ol 300 neŝtataj organizoj kaj societoj.

Kiel membro de UNO, Ĉinio ĉiam observas la celon kaj principojn de la Ĉarto de UNO pri defendo de paco kaj sekureco de la mondo. La registaro, publikaj societoj kaj vastaj popolamasoj de Ĉinio serioze traktas la agadojn pri la Jaro de Internacia Paco. Septembre de 1984, la ĉina registaro oficiale esprimis sian subtenon al la propono pri la Jaro de Internacia Paco kaj fondis la Ĉinan Organizan Komitaton, kiun konsistigas reprezentantoj de registaraj departementoj,

popolaj organizoj kaj sociaj eminentuloj. Ĝi jam komencis prepari aktivadojn por la jaro. Ili estas: okazigi en Pekino Mitingon de la Ĉina Popolo por Defendi la Mondpacon kun miloj da partoprenantoj reprezentantaj diversajn socitavolojn; okazigi en Ŝanhajo simpozion pri defendo de la mondopaco; okazigi artan, fotografian kaj kaligrafian eksponojn en Pekino; emisii oran kaj arĝentan monerojn kaj memorigajn poŝtmarkojn pri la Jaro de Internacia Paco; okazigi ceremonion de premiero de la dokumenta filmo "Sub la Sama Suno" ĉirkaŭ la Tago de Internacia Paco kaj eldoni memorigan albumon. Krome, iuj ŝtataj departementoj kaj popolaj organizoj partoprenas aŭ organizas kelkajn internaciajn aktivadojn. Ekzemple, januare, la ĉina registaro sendis reprezentantojn al la simpozio en Varsovio, proponita de la Sekretariejo

de la Jaro de Internacia Paco sub UNO, kun la diskuta temo "Preparo por la Paco Vivo", kaj al la internacia kunveno "Komuna Strebado al Paco" en Ĝenevo, organizita de neŝtataj organizoj. Aprile, la Tutlanda Federacio de Laborsindikatoj de Ĉinio invitis reprezentantojn de fremdlandaj sindikatoj al Pekino por diskuti pri la problemo de internacia paco. La Centro de Ĉinaj Geknaboj kaj aliaj organizoj kune okazigos en oktobro la Internacian Ekspozicion de Infanaj Pentraĵoj kun la temo "Ami Pacon, Ami Sian Hejmlandon". Novembre, sportistoj de Pekino, Ŝanhajo kaj Nankino partoprenos la unuan tutmondan stafetkuradon simbolantan mondpacon kaj kunlaboron.

Defendi la mondan pacon estas la plej grava kaj urĝa problemo por la homaro. En la unua duono de la kuranta jarcento la po-



La Mitingo de la Ĉina Popolo por Defendi la Mondpacon

poloj de la mondo suferis grandan perdon pro la du mondmilitoj. En la 40 jaroj post la Dua Mondmilito, kvankam ne eksplodis nova mondmilito, tamen la tumulto de la mondo ĉiam avertas, ke la milita minaco ne malaperis. La superpotencoj faras intensan interbatalon kaj konkuradon de armado, precipe konkuradon de nuklea armado, kiu serioze minacas la pacon kaj sekurecon de la mondo. Tial por defendi la mondan pacon la plej grava tasko estas oponi kontraŭ hegemonio, bremsi konkuradon de armado de la superpotencoj, likvidi nuklean minacon kaj preventi nuklean militon.

La ĉina registaro ĉiam praktikas la memstaran pacan politikon en la eksterlandaj aferoj kaj prenas la defendon de la monda

paco kiel sian ĉefan celon. Ĉinio firme staras ĉe la popoloj de la tria mondo, senĉese plifortigas la unuiĝon kaj kunlaboron kun ili. Samtempe Ĉinio aktive disvolvas normalajn ŝtatajn rilatojn, amikecon kaj kunlaboron kun diversaj landoj surbaze de la Kvin Principoj por Paca Kunekzisto. Ĉinio neniam alianciĝos, nek starigos strategian rilaton kun iu superpotenco, firme oponas kontraŭ interveno kaj agreso al aliaj landoj, kontraŭ uzo de milita forto kaj minaco per milita forto en la internaciaj rilatoj, kaj firme tenas la principon juste kaj pace solvi internaciajn konfliktojn.

Ĉinio ĉiam oponas kontraŭ diversaspeca konkurado de armado kaj faras ĉian penadon por tiu celo. Kvankam ĝiaj milita elspezo kaj nivelo de la militaj ekipa-

joj estas multe malpli altaj ol tiuj de aliaj grandaj landoj, tamen en 1985 la ĉina registaro iniciate reduktis sian armeon je miliono da personoj kaj prenis necesajn rimedojn por redukti militan elspezon. Ĉinio havas malgrandan nuklean forton, destinitan ekskluzive por rezisti kontraŭ agreso deekstera. De la unua tago, kiam Ĉinio ekhavis sian nuklean armilon, ĝi jam deklaris, ke ĝi neniam la unua uzos nuklean armilon. En la Mitingo de la Ĉina Popolo por Defendi la Mondan Pacon okazigita en la 21-a de marto ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang solene deklaris, ke Ĉinio jam plujare ne faris aeron eksperimentadon de nuklea armilo kaj ne faros plu tion en la estonteco. La ĉefministro koncize eksplikis la fundamentajn starpunktojn kaj

opiniojn pri la problemo de malarmado. La ĉefa enhavo estas: konkurado de nuklea armado grave minacas la pacon kaj sekurecon de la mondo, la fina celo de la nuklea malarmado devas esti kompleta malpermeso kaj ĝisfunda likvido de nukleaj armiloj. Usono kaj Sovetunio disponas plej grandajn rezervojn de nukleaj armiloj, kaj ili devas la unuaj ĉesigi eksperimentadon, fabrikadon kaj dispoziciadon de ĉia nuklea armilo, grandamplekse redukti kaj likvidi ĉeloke ĉiaspecajn nukleajn armilojn en kaj eksterlande, por krei pozitivajn kondiĉojn por okazigi internacian konferencon partoprenatan de ĉiuj nukleaj landoj pri nuklea malarmado kaj diskuti pri plua-paŝa malarmado kaj ĝisfunda nuligo de nukleaj armiloj. Por preventi eksplodon de nuklea milito, ĉiuj landoj posedantaj nukleajn armilojn devas preni sur sin respondecon: en nenia kazo la unua uzi nukleajn armilojn kaj neniam uzi nukleajn armilojn aŭ minaci per ili la landojn kaj regionojn sen nukleaj armiloj. Sur tiu bazo, ĉiuj nukleaj landoj kontraktu internacian konvencion por garantii malpermeson al uzo de nukleaj armiloj. Dum la nuklea malarmado oni devas fari ankaŭ grandskalan redukton de kutimaj armiloj. La spaco devas esti destinita por paco kaj feliĉigo al la homaro. Neniu lando devas per ĉia ajn metodo disvolvi, provi kaj dispozicii armilojn en la spaco. Por tio oni devas kiel eble plej frue kontrakti internacian konvencion de kompleta malpermeso de armado en la spaco kaj tiun de kompleta malpermeso kaj radikala nuligo de kemiaj armiloj. Ĉar la malarmado havas striktan rilaton kun la sekureco kaj intereso de ĉiuj landoj de la mondo, la grandaj landoj, nur kelkaj en

nombro, ne rajtas monopoligi ĝian solvon, kaj la interkonsento de malarmado inter grandaj landoj ne devas malutiligi aliajn landojn. Ĉiuj landoj, ĉu granda, ĉu malgranda, ĉu forta, ĉu malforta, devas havi egalan rajton en diskuto kaj solvo de problemoj koncernantaj malarmadon. La ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang montris, ke malarmado ne estas unika problemo koncernanta la mondajn pacon kaj sekurecon, ke atenci la sendependecon kaj suverenecon de aliaj landoj ja estas minaci la mondan pacon. Por mildigi la streĉan situacion kaj forigi regionajn konfliktojn oni devas rigore observi la principon de egalrajteco de ĉiuj landoj ĉu grandaj ĉu malgrandaj, kaj neniel devas interveni en internajn aferojn de aliaj landoj kaj atenci ilian suverenecon, kaj nur tiele oni povas defendi la mondan pacon.

En la lastaj jaroj leviĝis grand-skala paca movado tra la tuta mondo, la plej granda kaj plej influhava amasmovado en la nuna mondo. Tio spegulas la aspiron al paco kaj abomenon al milito ĉe la mondaj popoloj. La miliardo da ĉinoj estas firmaj defendantoj de la monda paco kaj varmaj subtenantoj de la mond-paca movado. Estas ĉinaj antikvaj vortoj: "Mondo apartenas al ĝiaj loĝantoj." La popoloj de diversaj landoj estas kreantoj de la monda historio. La popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj prenu la aktivadon de la Jaro de Internacia Paco kiel la novan start-punkton de gajno de eterna monda paco kaj la temon de la jaro kiel celon probatalatan en longa tempo. Jen tiele oni povos preventi eksplodon de mond-milito kaj nuklea milito kaj gajni longtempan pacon por la nuna homaro kaj ĝiaj posteuloj.

Tarifo: unu internacia respondkupon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 20-jara fraŭlo Fang Yong deziras kontakti kun esp-istoj tutmondaj kaj kolekti E-librojn, gazetojn, insignojn kaj p.m. Jiangkou Gonglu, Zhijiang Xian, Hubei, Ĉinio.
- * Vol. kor. tutmonde, Dong Liang k. Chen Shoubao, 301, Xiangyang 17 Lou, Huashan Qu, Maanshan, Anhui, Ĉinio.
- * 26-jara fraŭlo Fang Miaoqing, Tonglu Nongye Yinhang, Zhejiang, Ĉinio, vol. kor. kun amikinoj el Usono, Britio, Kanado kaj Aŭstralio, pri filozofio, literaturo kaj historio esperante aŭ angle.
- * 36-jara portisto Mo Zhixiong Wuhan Juanyan Chang, Qiaokou, Wuhan, Ĉinio, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj, ĉiam respondos al ĉiu.
- * E-kurso k. ekspozicio baldaŭ okazos. Estas bonvenaj esperantaĵoj el la tuta mondo. Bv. sendi al s-ro Huang Yong, P.O. Kesto 542, Yichang Shi, Hubei, Ĉinio.
- * Nove fondita libroservo peras E-eldonaĵojn de ĉiuj jugoslavaj eldonistoj! Petu senpagan katalogon! Preskaŭ ĉion nuntempe haveblan en la jugoslava E-merkato, vi trovos unuloke, kun rabatoj ĝis 50% por grandkvantaj aĉetoj. Konfidu viajn mendojn al nia libroservo: Esperanto-kлубo "Koko", B. Markaca 1, YU-43350 Durdevac, Jugoslavio.

Dolĉakva fiŝbredado en la "millaga provinco"

La provinco Hubej situas norde de la lago Dongting. En la antikveco tie sternaĝis vastega nebula marĉejo. Post multe da jarcentoj, pro sedimentado de Jangzi-rivero kaj ĝia branĉo Hanŝuj, aperis Ĝjanghan-ebenaĵo kun areo de 30 000 kvadrataj kilometroj. Tie interkruĉiĝas riveroj kaj dissemiĝas lagoj, tial oni alinomis ĝin "millaga provinco". Eĉ en

montregiono troviĝas akvaro por fiŝbredado. La provinco havas 898 000 hektarojn da akvaro, el kiuj 527 000 estas uzablaj por fiŝbredado. Tie estas unu el la famaj dolĉakvaj fiŝbredejoj en Ĉinio. Laŭplane, ĉi-jare produktiĝos 240 milionoj da kilogramoj da fiŝoj.

Vivas 136 specoj da fiŝoj en Jangzi-rivero kaj ĝiaj branĉoj kaj

lagoj en la provinco. La nombro konsistigas duonon de la totalaj specoj en la tuta riverbaseno. Estas pli ol 30 specoj da gravaj ekonomiaj fiŝoj. Krom ciprinoj kaj diversaspecaj karpoj, kiaj nigraj, herbovoraj, arĝentaj kaj grandkapaj, tie produktiĝas ankaŭ malakramuzelaj bramoj (*Megalobrama amblycephala*), mandarinaj fiŝoj, Ŭej-fiŝoj (*Leio-*

Fiŝkaptado en akvorezervejo





Konstruado de fiŝbaseno en marĉejo

cassis longirostris) kaj aliaj, tre famaj kaj valoraj en- kaj eksterlande.

La malakramuzela bramo estas nutroriĉa kaj preferata en festeno. En Fankoŭ, kie enfluas la lago Ljangzi al Jangzi-rivero, abundas tiaj fiŝoj. La vasta lago kun riĉaj akvaj plantoj taŭgas por fiŝbredado. Kiam la aŭtuna vento ruĝigas la acerfoliojn, la fiŝoj en la lago naĝas tra enfluejo ĉe Fankoŭ en Jangzi-riveron kaj tie la fiŝistoj ilin kaptas grandkvante. En 1964 la koncerna organizo sukcesis en la provinco

generigi fiŝojn. Kaj nun ili estas bredataj en 26 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando.

En la foiroj kaj vendejoj de dolĉakvaj produktaĵoj sur Ĝjanghan-ebenaĵo estas facile aĉeteblaj vivaj fiŝoj kaj salikokoj. La fiŝoj vendataj en la merkato aŭ transportataj al urboj estas pliparte liveritaj de ŝtataj, kolektivaj kaj kamparanaj fiŝbredejoj. Entreprenado de basena fiŝbredado markis gravan turniĝon. Ĉar ekde la 50-aj jaroj la akvoutiliga konstruo, la industria polucio kaj

la neracia ekspluatado de dolĉakvaj riĉfontoj perturbis la ekologian ekvilibron kaj la fiŝoj rimarkinde reduktiĝis. Por protekti akvajn riĉfontojn ekde la lasta periodo de la 70-aj jaroj la provinca registaro faris gravajn reguligojn, kiel konstrui vastan fiŝbredejon per ŝtata investo kaj doni permeson al kamparanoj en ilia privata fiŝbredado, krom malpermesi reduktadon de akva surfaco de lago, bremsi la polucion kaj profundigi la lagon per drag-ŝipo.

Mjanjang-gubernio en la centro de Ĝjanghan-ebenaĵo estis famkonata fiŝproduktejo en historio. De 1949 por radikale elimini inundon la gubernio faris grandskalan akvoutiligan konstruadon. La grenkvanto pligrandiĝis ĉiujare. Tamen, pro neglekto de la disvolviĝo en fiŝbredado kaj pro teroekspluatado ĉe lago, la natura akvosurfaco reduktigis de 34 000 hektaroj al 6 000. Kaj tiel mankis fiŝoj en la regiono antaŭe riĉa je fiŝoj. Konsiderante, ke oni ne povas restarigi la antaŭan staton de akvaj riĉfontoj, en la lastaj jaroj la registaro alvokis, ke la kamparanoj konstruu fiŝbasenojn en marĉejoj, lagoj malfekundaj kaj ne tre influaj al grenprodukto. Ĝis nun, en la tuta gubernio la fiŝbasenoj havas areon de 2 200 hektaroj, kun totala fiŝproduktokvanto de 21 milionoj da kilogramoj.

La lagoj kaj akvokonservejoj de Hubej-provinco konsistigas 68% de la akvosurfaco por fiŝbredado, sed la kvanto de la akvoproduktaĵoj okupas nur 23% de tiu de la provinco. Du trionoj de la lagoj kaj akvokonservejoj restas ankoraŭ neutiligataj. Eĉ la akvokonservejoj, kie oni bredas fiŝojn, plejparte rikoltas malmulte, po nur 150 kilogramojn da fiŝoj por ĉiu hektaro. En la

lastaj jaroj oni faris eksperimentadon pri bredado de karpoj en retoj per miksitaj nutraĵoj en la akvokonservejo Bajljanhe de la gubernio Jingŝan kaj aliaj lokoj kaj gajnis spertojn taŭgajn por nia lando. La breda tempo daŭras 3-5 monatojn. Ĉiu kubmetro da akvo produktas 20-30 kilogramojn da fiŝoj. Nun la tuta provinco havas akvoareon de pli ol 38 hektaroj por tia bredado. Sole en la akvokonservejo Bajljanhe estas 6 200 retkestoĵoj. Krome, oni faras ankaŭ ĉirkaŭbaran bredadon en lago, interalie la areo por delikata bredado atingis 333 hektarojn, kun hektara produkto-kvanto de ĉ. 4 000 kg.


Oni bredas fiŝojn ne nur en lagoj, basenoj kaj akvokonservejoj sed ankaŭ en rizkampoj. En ĉiu hektaro da rizkampo oni povas bredi 900 fiŝidojn. Tie fiŝoj bone kreskas, kaj samtempe ili utilas al rizplantoj: Ili manĝas

herbaĉojn kaj insektojn, pliigas la oksigenon en la akvo kaj liveras sterkon per sia fekaĵo. Kiam kamparanoj disŝutas insekticidon aŭ kemisterkon, ili pelas la fiŝojn en antaŭe preparitajn apartajn kavojn por protekti ilin. Post kiam la kemiaĵoj perdis efikon kaj la rizkampo estas denove irigaciita, oni ellasis la fiŝojn en la kampon. Ŭang Ŝujĉing, kamparano en Eĝoŭ, bredis fiŝojn en sia rizkampo de 1/7 hektaro kaj rikoltis 800 kilogramojn da rizo kaj ankaŭ 600 kilogramojn da fiŝoj en la pasinta jaro.

La esploro pri akvoproduktaĵoj rimarkinde disvolviĝis. La Ĉina Akademio de Sciencoj fondis en Ŝaŝi-urbo la Instituton de Akvoproduktaĵoj de Jangzi-rivero, kaj Hubej-provinco kaj la urbo Uhan fondis siajn instancojn pri la akvoprodukta scienco. Troviĝas ankaŭ ŝtataj fiŝbredejoj kaj kulturejoj de fiŝidoj en gubernioj. En

la pli ol 20 jaroj post sia fondiĝo la Instituto de Akvoproduktaĵoj de Jangzi-rivero prenis sur sin ĉ. 50 scienc-esplorajn temojn, el kiuj 30 akiris sukcesojn. En 1978 la instituto importis afrikajn karpojn, kiuj rapide kreskas. Nun oni jam sukcesis ilin reprodukti. En la sekva jaro ili invitis teknikistojn diverslokajn tra la lando kaj lernigis al ili senrezerve bredarton pri la fiŝoj kaj senpage liveris al ili fiŝidojn. Post nemultaj jaroj la fiŝoj jam aperis en la baseno de la Flava Rivero, Hajnan-insulo en suda Ĉinio kaj eĉ Hejlongĝjang-provinco en la Nordoriento. En 1985 la tuta lando produktis 50 milionojn da kilogramoj da afrikaj karpoj. Krome, oni sukcesis ankaŭ en eksperimento pri ĉinaj kraboj kaj reprodukto de ĉinaj huzoj. Ĉio ĉi tio montras la saĝon kaj talenton de sciencistoj pri akvoproduktaĵoj de la provinco.

Lokoj Menciitaj en Ĉi Tiu Numero



1. Tangŝan
2. Hubej-provinco
3. Junnan-provinco
4. Uhan
5. Tibeta Aŭtonoma Regiono
6. Langŝoŭ
7. Ŝanhajo

Astronaŭtiko servas al la nacia ekonomio


Astronaŭtiko estas avangarda scienco de la homaro por ekspluati kaj utiligi la eksteran spacon. Ĝia disvolviĝo estas nedisigebla de la plej novaj atingoj de ĉiuj modernaj sciencoj kaj teknikoj. Tial, uzi astronaŭtikon en la nacia ekonomio povas akiriĝi rapidan disvolviĝon kaj bonan efikon en ekonomio.

La ĉina astronaŭtika afero trapasis 30 jarojn. Dum tiu pe-

riodo la ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj starigis kaj disvolvis sian avangardan astronaŭtikan aferon, sin apogante sur la propraj fortoj kaj surbaze de la relative postiĝintaj ekonomio, sciencoj kaj teknikoj. Post kiam ili lanĉis mallongdistancan transportan raketon en 1960 per memfarita fuzaĵo, ili akiris sinsekvajn novajn fruktojn. Ekz., en 1964 Ĉinio lanĉis la unuan transpor-

tan raketon memfaritan; en 1967 la hundeto Ŝjaŭbaŭ faris vojaĝon en la ekstera spaco per biologia raketo; en 1970 la unua ĉina artefarita satelito "Dongfanghong n-ro 1" eniris la orbiton ĉirkaŭ la terглоbo; en 1975 Ĉinio lanĉis tri artefaritajn satelitojn kaj unuafoje sukcesis repreni sateliton; en 1981 Ĉinio unuafoje lanĉis tri satelitojn per unu transporta raketo; en 1982


La mikroonda regada sistemo kaj eksperimenta telekomunika satelito faritaj de Ĉinio estas aplikataj en telekomunikado, disaŭdigo kaj televizio.



Ĉinio lanĉis transportan raketon de submara ŝipo; en 1984 tri-ŝtupa transporta raketo farita de Ĉinio precize portis la unuan eksperimentan telekomunan sateliton en la sinkronan orbiton de la terglobo; kaj je la 1-a de februaro ĉi-jare Ĉinio sukcese lanĉis praktikan telekomunan kaj disaŭdigan sateliton, kiu lokiĝas je 35 700 km. super la ekvatoro ĉe 103 gradoj de la orienta longitudo.

En la moderna ekonomia konstruado la rolo de informoj fariĝas pli kaj pli grava. La astronautiko estas la plej bona rimedo akiri kaj transmissii informojn. Ĝi karakteriziĝas per granda kapacito, rapida transmissio, malmulta media interfero kaj grandarea efiko. La eksperimenta telekomuna satelito lanĉita en 1984 solvis la malfacilan problemon, ke Urumĉi de Ŝinĝjang, Lhasa de Tibeto kaj aliaj malproksimaj urboj kaj regionoj ne povis rigardi la koloran televidan programon de la Ĉina Centra Televido en la sama tago kiel Pekino. La ĉi-jare lanĉita praktika telekomuna kaj disaŭdiga satelito havas pli grandajn povon kaj kapaciton kaj pli altan kvaliton de transmissio ol la antaŭa, rezulte diversaj lokoj de la tuta lando ricevas altkvalitan programon.

La surteraj satelitaj stacioj en la vasta areo, kun la Ĉengdu-a regiono de Siĉŭan-provinco kiel la centro, kiu etendiĝas oriente ĝis Ŝanhajo, okcidente ĝis Lhasa, norde ĝis Huhhot kaj sude ĝis Nanning kaj konsistigas 40% de la totala teritorio de Ĉinio, povas bone ricevi la programon de la Ĉina Centra Televido per anteno de 3-metra diametro. La nord-orienta Ĉinio, nordokcidenta Ŝinĝjang, okcidenta Tibeto kaj Hajnan-ĝinsulo povas ricevi la pro-



Ĉinio unuafoje lanĉis tri satelitojn per tiu transporta raketo.


gramon de la Ĉina Centra Televido per anteno de 6-metra diametro.

La telekomuna kaj disaŭdiga satelito povas disvastigi aŭdavidan edukon tra la tuta Ĉinio. Tio povos altigi la kulturan nivelon de la popolamasoj kaj popularigi kulturajn kaj sciencajn sciojn en la kamparo en certa grado.

La aplikado de la telekomuna kaj disaŭdiga satelito akcelis la disvolviĝon de la ĉina elektronika industrio. La ŝtato jam provizis la 29 provincojn, muni-

cipojn, aŭtonomajn regionojn de Ĉinio per 200 kompletoj da ekipaĵoj por ricevi satelitan televidan programon kaj komencis eksporti ilin. Krome, ĝi grandkvante produktas ankaŭ diversajn ekipaĵojn, kiaj televida relajso, aparatoj por programa farado kaj elsendo.

Astronautiko povas akiri informojn el granda areo kaj havas altan apartigan povon. Ekz., tergloba observa satelito, ekipita per malproksime impresiĝemaj aparatoj, povas akurate doni al naciaj ekonomiaj departementoj kaj scienc-esploraj institutoj pre-



La surtera satelita ricevostacio kun 6-metra anteno

cizajn informojn pri la naturaj rezervoj de la tuta lando kaj detalajn materialojn pri kontinento kaj maro; ĝi povas fari periodan kontrolon kaj mezuradon al esplorota regiono, laŭ kio oni povas fari sciencan decidon en la tuteco por ke la ekspluata plano estu pli konforma al la konkreta cirkonstancaro. Ĉinio jam komencis apliki materialojn akiritajn per satelitaj malproksime impresigemaj aparatoj en scienc-esplorado kaj produktado, inkl.

de petrola prospektorado, geologia enketado, oceana kaj marborda mezurado, mapa mezurado kaj desegnado, elektado de fervoja linio, havena kaj rivera konstruado, elektado de elektreja situo kaj arkeologio.

Nun la ĉinaj astronautikaj teknikoj eniris porkomercan etapon. Antaŭ la ĉi-jara lanĉo de la praktika telekomunika kaj disaŭdiga satelito, la Ĉina Popola Asekura Kompanio asekuris ĝian lanĉon. La satelito-lanĉaj centroj

Ŝjiĉang kaj Ĝiŭĉjŭan de Ĉinio kaj la mezurrega reto kun Ŭejnan kiel la centro oficiale malfermiĝis al fremdaj landoj kaj povas doni lanĉan servon al en- kaj eksterlandaj klientoj. Ĉinio traktas kun Svedio kaj aliaj landoj provfaradon de satelita sistemo aŭ lanĉadon de satelito.

Ĉinio posedas du specojn da raketoj CZ-tipaj, kiuj povas porti sateliton en difinitan orbiton. Inter ili la grand-tipa 3-ŝtupa raketo CZ-3 kun likva brulaĵo kun avangardaj teknikoj sukcesis porti du satelitojn en terglobo orbiton. Ĝi povas porti 1.4 tunojn pezan sateliton en la terglobo sinkronan orbiton per la dua kosma rapideco. Ĝi povas ankaŭ porti grandan flugan aparaton pezan je 4.5 tunoj en la perigeon orbiton per la unua kosma rapideco. Nun la raketo CZ-3 jam povas lanĉi sateliton por en- kaj eksterlandaj klientoj.

La ĉina astronautika industrio kun historio de 30 jaroj jam posedas pli avangardajn kaj pli perfektajn teknikojn kaj rimedojn en esplorado, projektado, eksperimentado, produktado, mezurado kaj provado. Por ĝi estas vicaro el diversfakaj specialistoj, inĝenieroj kaj teknikistoj. Ili estas spertaj en aplikado de sistema inĝenierado por provfarado, produktado, eksperimentado kaj en scienca administrado kaj akiris ĉ. 5 000 sciencajn atingojn. En la lastaj jaroj la astronautikaj departementoj de Ĉinio, vaste kunlabore kun aliaj industriaj fakoj en teknologio, provfaris kaj produktis multajn avangardajn ekipaĵojn por iuj naciaj ekonomiaj departementoj, vendis al tiuj nombrojn da avangardaj teknikoj. Per tio ili kontribuis al la moderniga konstruado de Ĉinio kaj prezentis pli kaj pli vastan perspektivon tiuflanke.

Esperantaj Libroj

Literaturaj verkoj:

Kanto de Juneco (romano)	312pĝ.	£1,90	US\$3,90	10-Es-605P
Noveloj de Lusin (noveloj)	532pĝ.	£2,80	US\$4,80	10-Es-1290S
Aŭtuno en la Printempo (novelo)	116pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1525
El Ĉina Poezio (poemoj)	166pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1526
Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang (eposo)	58pĝ.	£1,55	US\$2,85	10-Es-71S
Montara Vilaĝo (romano)	272pĝ.	£3,85	US\$7,80	10-Es-1882S
Bronza Tigro (dramo)	138pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1954S
Verkoj de Verda Majo	510pĝ.	£4,20	US\$8,50	10-Es-1653S
Bukedo al Vi (mikronoveloj)	96pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1881P

Popolaj rakontoj:

Rakontoj pri Afanti	78pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1578PA
Saĝo-sako	78pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1778P
La Feliĉa Birdo	56pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1866P
Papilia Fonto	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1883P
Magia Ŝipo	76pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1623PA

Feniksa libraro:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio	272pĝ.	£1,90	US\$3,90	12-Es-1825P
Dek Ses Urboj de Ĉinio	176pĝ.	£1,90	US\$3,90	17-Es-1885P
Mia Vivo	128pĝ.	£0,80	US\$1,70	17-Es-1884P
Pitoreska Pekino	74pĝ.	£0,95	US\$2,00	17-Es-1827P
Albumo pri Ĉinio	98pĝ.	£1,90	US\$3,90	85-Es-175P

Infanlibroj:

Kolorigu	120pĝ.	£2,90	US\$5,90	88-Es-205P
Bonkora Ŝjaudon	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-204P
Brava Kolombido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-244P
Petolema Kaprido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-241P
Lutro kaj Bufo	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-242P
Kokido Venĝis Sian Panjon	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-246P
Du Katetoj	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-243P
Senmortigaj Fruktoj	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-194P
Plau! Plau!	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-201P
En la Bestoĝardeno	80pĝ.	£1,30	US\$2,60	88-Es-174P
Magia Peniko	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-178P
Anaseto kaj Koĝeto	28pĝ.	£0,35	US\$0,70	88-Es-176P
Ora Hakilo	32pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-195P
Kiel Kovi	28pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-196P
Malatentema Virino	24pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-197P
Vostkonkurso	16pĝ.	£0,30	US\$0,65	88-Es-200P
Konstrui Novan Ponton	40pĝ.	£0,22	US\$0,40	88-Es-156P
La Fiera Multkolora Kateto	44pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-154P

Mapo de la Ĉina Popola Respubliko £0,50 US\$0,95 12-Es-176P

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Perantoj de EPC

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-DIAN)**, Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Malkovro de misteroj de la "Monda Tegmento"

— Pri la scienca esplorado de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo

de LU GŬOJŬAN

En la okcidenta parto de Ĉinio kuŝas la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo kun totala areo de pli ol 2 000 000 kvadrataj kilometroj. Tiu vasta tero leviĝinta el senlima maro gajnis la belan nomon "Monda Tegmento" per sia meznombra alteco de pli ol 4 000 metroj super la marnivelo. Ĝiaj leviĝo kaj evoluo lasis al la homaro multajn sciencajn enigmojn: Kiel ĝi leviĝis? Kiam formiĝis la "Monda Tegmento"? Kiaj ŝanĝiĝoj okazis al la natura medio kun la leviĝo de la altebenaĵo? . . . Post la paca liberiĝo de Tibeto ĉinaj sciencistoj faris pli-ol-30-jaran kampan sciencajn esploradojn kaj malkovris ĝiajn misterojn.

Junie de 1951, 47 sciencistoj el la Ĉina Akademio de Sciencoj, Pekina Universitato, Ĉinghŭa-universitato kaj koncernaj departementoj de la Centra Popola Registaro de Ĉinio, en kvin grupoj, venis al la altebenaĵo kaj levis la kurtenon de grandskala ĝenerala scienca esplorado de la "Monda Tegmento". Sub ekstreme malfacilaj kondiĉoj ili faris du-jarajn esplorojn pri geologio, geografio kaj biologio en orienta kaj suda Tibeto. Ili trovis plurajn emergajn ercojn kaj dekojn da valoraj ercaj regionoj. Samtempe kun tio ili ekhavis konon

pri la topografio, geomorfologio, paŝtherboj kaj akvaj riĉfontoj en la regiono. En 1959 la dua grupo de ĝenerala scienca esplorado, sub la gvido de geomorfologo Ŭang Mingje, ascendis la montpinton Ĉomolangma kune kun la Ĉina Montgrimpa Trupo kaj akiris grandan kvanton da geologiaj kaj geografiaj materialoj. En 1960 kaj 1961 la Ĉina Akademio de Sciencoj sendis tien esploran taĉmenton kun pli ol cent fakuloj pri geologio, geografio, biologio, agrokulturo kaj forstokulturo por pluaparte esplori la regionojn de Ngaĉju, Ŝigaze kaj Lhasa.

Por kiel eble plej rapide malkovri la misterojn de la "Monda Tegmento", la Ĉina Akademio de Sciencoj ellaboris en 1972 plenaryksan sisteman planon por esplori la Ĉinghaj-Tibetan Altebenaĵon kaj ekde 1973 sendis tien pli ol mil sciencistojn de pli ol 70 sciencaj institucioj kaj altlernejoj de 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando. Tie ili faris ĝeneralan sciencajn esploradojn en septaroj. En tiu esplorado ili atingis bonajn sukcesojn kaj metis bazon por plenarykse malkovri la misterojn de la altebenaĵo.

En 1973 sciencistoj laboris du monatojn en glaĉeraj regionoj pli

ol 4 000 metrojn super la marnivelo. Ili unuafoje faris kompare sisteman esploron pri maraj glaĉeroj de Ĉinio. Ili kolektis en profundaj valoj fosiliajn kaj rokajn specimenojn kaj serĉis la kialon de leviĝo de la altebenaĵo kaj la leĝon pri diferenciĝo de fizikgeografiaj kondiĉoj. Ili trovis pli ol 40 novajn vegetalajn speciojn, kolektis novan ordon de apterigaj insektoj kaj per tio kontribuis al la studo pri formiĝo kaj evoluo de biozonoj de Ĉinio. Ili piediris du monatojn por fari esploradojn en la granda ravino de la rivero Jarlung Zangbo kaj ricevis abundajn materialojn de geologio, geomorfologio kaj akvoenergio.

En 1974, samtempe kun la ĝenerala esplorado de la orienta parto de Ŝigaze, Ŝannan-regiono kaj Lhasa, sciencistoj transiris la neĝkovritan montaron Himalaja, la riveron Jarlung Zangbo kaj densajn arbarojn, faris detalan sciencajn esploradojn al Medogubernio, sole senŝosea en Ĉinio. Ili unuafoje kolektis kompare sistemajn sciencajn materialojn de hidrologiaj karakterizaĵoj, geologia strukturo, geomorfologio de la rivervalo, arbaraj riĉfontoj, fizika geografio, flaŭro, biologio k. a. kaj trovis grandan nombron da novaj specioj de



Scienc-esploristoj observas nove trovitan fosilion.

animaloj kaj vegetaloj en tiu regiono.

La ĝenerala esplorado en la tria jaro multe progresigis studon pri la geologia historio. Sciencistoj unuafoje trovis fosiliojn de iaspecaj libeloj kaj koraloj en la tertavoloj inter la suda parto de Ĝongba kaj la norda piedo de Himalajo kaj paleozoikan stratumon inter la norda parto de Ĝongba kaj la suda piedo de Ganggardesi-montaro. Vertebraraj paleontologoj kaj paleoantropologoj unuafoje trovis multajn fosiliojn de pli ol dek animaloj, kiaj hipariono (*Hipparion*), hieno, rinocero, leporo, cervo kaj antilopo, en la suda kaj norda partoj de Tibeto. Tiuj trovaĵoj montris, ke dum la plioceno kaj la frua plejstoceno antaŭ 3 ĝis 10 milionoj da jaroj, la altebenaĵo estis malalta loko kun humida kaj varma klimato, abunda je lagoj kaj vegetaloj, kaj poste la terkrusto multe leviĝis kaj formis la altebenaĵon, kio liveris tre gravan sciencan bazon por studi ĝian leviĝon. Por ekspluati geotermofontojn de Tibeto, tiujare sciencistoj iris pli ol 9 500 km. Ili esploris 117 ter-

mofontajn grupojn, trovis pli ol 30 bolantaj fontojn superantaj la lokan bolpunkton, varmajn riverojn formiĝintajn el interligitaj termofontoj, ŝprucadon de varma akvo kiel erupcia vulkano, intermitajn fontojn kaj diversajn tervarmajn fenomenojn. Precipe en Ganggardesimontaro ili trovis bolantan fonton kaj la plej grandan intermitantan fonton plej alte super la marnivelo en Ĉinio.

La ĝenerala scienca esplorado de 1976 iris ĉefe sur la Nordtibeta Altebenaĵo kun areo de pli ol 300 000 kvadrataj kilometroj. Kiel parto de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, tiu regiono estas la plej alta kaj frosta kaj preskaŭ senhoma. Antaŭ la paca liberiĝo de Tibeto alilandaj fakuloj, rigardinte nur kelkajn lokojn en tiu regiono, asertis, ke tiu regiono estas "seka centro", "senviva loko", "havanta nur iom pli ol 50 vegetalajn speciojn" kaj "dezerta loko" kovrita plurfoje de glaĉeroj. Post kvarmonata ĝenerala esplorado pri geologio, geomorfologio, sallagoj, grundo, hidrologio, vegetaloj kaj animaloj, la ĉinaj sciencistoj ko-

rektis la erarajn asertojn de alilandaj fakuloj per elokventaj faktoj. La esplorado montris, ke sur la Nordtibeta Altebenaĵo ofte falas hajlo kaj grajlo de junio ĝis aŭgusto kaj estas granda la neĝokvanto en januaro kaj februaro. La tersurfaco degelas en varma sezono, tamen en iuj lokoj kuŝas eterna kriogrundo. Al la grundo ne mankas akvo. La tiel nomata "kovrita de glaĉeroj" ja estas senbaza dirajiĝo. Eĉ en la plej frosta regiono sciencistoj ne trovis lokon plene kovritan de antikva glaĉero. Tie ili kolektis ĉ. 300 vegetalajn specimenojn, el kiuj pli ol cent estis kolektitaj en la plej frosta nordokcidenta parto. Tiu loko estas natura zoologia ĝardeno. Antilopoj, ovioj, naemoredoj (*Naemorhedus goral*) kaj kiangoj moviĝas de kope aŭ centope sur stepo, grizvostaj leporoj kaj vulpoj kuregas sur montoj, neĝleopardoj kaj brunaj ursoj vivas surmonte, makulkapaj sovaĝanseroj, nigra-kolaj gruoj, brunaj anasoj kaj merĝoj naĝas surakve. En montrivereto 5 200 metrojn super la marnivelo sciencistoj trovis nemaĉilojn (*Nemachilus barbatus*), kiuj estas ĝis nun konataj fiŝoj vivantaj en la plej alta loko.

Unuapaŝe analizinte kaj ordiginte la rezulton de la kampa esplorado ricevitajn en la sinsekvaj kvar jaroj, sciencistoj faris al dezertaj montoj de junio ĝis aŭgusto 1979 grandskalan ĝeneralan sciencan esploron surbaze de plurfojaj esploroj. Ili, ne timante malfacilojn, nek glacieron kaj neĝon, iris pli ol 50 000 km. kaj kolektis pli ol 10 000 fosiliojn kaj specimenojn de vegetaloj, praaĵ bestoj kaj vegetaloj, rokoj, grundo, torfo, sulfuraj izotopoj kaj oksihidrogenaj izotopoj de subtera varma akvo, ricevis pli ol 1 500 donitaĵojn kaj materialojn pri gravitmezur-

paleogeomagnetismo, elŝprucado de subtera termofonto, fizika geografio kaj klimato kaj ankaŭ trovis novajn speciojn de vegetaloj kaj praaj bestoj kaj vegetaloj. Tiel sukcese finiĝis la sepa sistema kaj multfaka ĝenerala esplorado.

Samtempe kun la ĝenerala scienca esplorado al la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, la ĉinaj sciencistoj multfoje faris fakajn sciencajn esplorojn. Fakuloj pri kriogrundo faris enketadon en la kriogrunda zono inter la montaroj Kunlun kaj Tanggula en tri jaroj ekde 1960. Ili aktivadis sur neĝkovritaj montpintoj kun maldensa aero aŭ sur dezerta stepo kaj postlasis siajn spurojn sur areo de pli ol 3 000 kvadrataj kilometroj. Ili kolektis kaj ordigis materialojn de pli ol 200 000 ideografiaĵoj kaj per tio kontribuis al studo de altebenaĵa kriogrundo. Glaĉerologoj tendumis en frostaj kaj oksigenomankaj glaĉerejoj por studi la formiĝon, evoluon kaj moviĝon de glaĉeroj sur la altebenaĵo. Sciencistoj pri lagoj konstatis, ke Tibeto havas dense dissematajn lagojn kaj plej abundajn lagajn riĉfontojn. Sur la Tibeta Altebenaĵo troviĝas pli ol mil lagoj, kiuj konsistigas ĉ. duonon de la totala nombro de la lagoj de Ĉinio. Ilia areo estas ĉ. 30 000 kvadrataj km., trione kiom tiu de la totala lag-areo de la lando. La lagoj kaj montaroj irantaj tie de oriento al okcidento estas preskaŭ paralelaj, kvazaŭ brilaj perloj sur la altebenaĵo. Tiuj lagoj kaj la malprofundaj lagoj en la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero formis du laggrupojn de Ĉinio, kun granda diferenco en alteco. Biologoj sinsekve kolektis dekmilojn da vegetalaj specimenoj. Ĝis 1980 estis ekspertizitaj specimenoj de 2 305 insektopecioj, el kiuj 400 estas novaj; el la akvaj

vertebruloj skizotorakso (*Schizothorax*) sola havas 48 speciojn, kiuj konsistigas 50% de la specioj jam konataj; la amfibiaj kaj surteraj vertebruloj havas 835 speciojn, el kiuj 571 estas birdospecioj konsistigantaj trionon de la konataj birdospecioj de Ĉinio.

Post proksimume 20-jara peniga kampa esplorado la ĉinaj sciencistoj verkis disertaĵojn por klarigi la kialon de leviĝo de la altebenaĵo, per studo pri geofizika magneta kampo, geologia strukturo, stratigrafia paleobiozono, roka paleogeomagnetismo, magma aktivado, metamorfo, tervarma aktivado, nova struktura aktivado kaj streĉiĝa kampo de moderna strukturo de la altebenaĵo. Plejparto de la sciencistoj opinias, ke la kialo de leviĝo de la altebenaĵo kuŝas en tio, ke la hinda plato iom post iom moviĝis norden ekde la kretaceo kaj koliziis kun la eŭropa-azia plato.

La simpozio pri la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo okazinta en Pekino en majo 1980 estis grandioza kunveno por revui la fruktojn ricevatajn de la ĉinaj sciencistoj en multfojaj sciencaj esploradoj kaj studoj al la altebenaĵo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la simpozio la aserto pri leviĝo de la altebenaĵo, bazita sur kontinenta moviĝo kaj teorio pri plata strukturo, estis akceptata de pli kaj pli multaj sciencistoj. Oni plue konstatis, ke la bordoj de la rivero Jarlung Zangbo apartenas al du malsamaj platoj kaj la faŭlta zono ja estas kaŭzita de la kolizio de la du platoj, hinda kaj azia-eŭropa. En la simpozio oni anoncis mirindan malkovron, ke la altebenaĵo ankoraŭ ne ĉesis leviĝi kaj ĝi leviĝas je pli ol 10 milimetroj ĉiujare. En la simpozio unuapaŝe malkovriĝis la mistero pri leviĝo kaj evoluo de la altebenaĵo.

Dum la esplorado de la leviĝo de la altebenaĵo sciencistoj pli kaj pli profunde konis ĝian veran fizionomion. En esplorado de stratuma paleontologio sciencistoj klarigis konsiston de paleobiozono kaj paleogeografian medion en diversaj geologiaj epokoj ekde paleozoiko, sur la bazo de analizo de granda nombro da fosilioj kaj stratigrafiaj materialoj kolektitaj en diversaj lokoj de Tibeto. En petrologia esplorado ili unuapaŝe malkovris la aktivadajn tempon kaj regionon de magmaj rokoj kaj metamorfaj rokoj kaj la karakterizaĵojn de la aktivado de magmaj rokoj kaj la roka metamorfo kaj klarigis la formiĝon de magmaj rokoj. En geofizika esplorado ili neis la supozon, ke la altebenaĵo estas formita el dutavola terkrusto, kaj elmetis la teorion, ke ĝi estas tavolkrusta modelo formiĝinta el plurtavolaj periloj, sur la bazo de materialoj pri naturaj tertremoj, gravito, paleogeomagnetismo, geoelektromagnetismo, precipe materialoj pri artefaritaj tertremoj. En esplorado de fizika geografio, ili pli amplekse kaj sisteme studis la klasifikojn, karakterizaĵojn kaj dispoziciojn de klimato, geomorfologio, glaci-riveroj, kotŝtonaj fluoj, riveroj kaj lagoj sur la altebenaĵo kaj iliajn leĝojn pri estiĝo kaj evoluo en la leviĝo de la altebenaĵo. En biologia esplorado ili kolektis grandan kvanton da materialoj, trovis multajn novajn speciojn kaj unuapaŝe malkovris la leĝon pri konsisto, estiĝo kaj evoluo de la altebenaĵa biozono.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj la ĉinaj sciencistoj impetis en la konado de la "Monda Tegmento", kio tamen estas nur fundamenta en la kompleta kono. Por pluapaŝe malkovri la misterojn de la altebenaĵo ili ankoraŭ devas fari persistan klopodon.




Sciencistoj esplorantaj en neĝkovrita montaro.

Foto de **CAJ LONG**

Esplorado en valo

Foto de **LU GŬOJŬAN**






Subakva eksperimentado en la lago Jarĝojum en suda Tibeto

Foto de **ŜJU ĈJUN**




Ornitologoj faras specimenojn de raraj birdoj.

Foto de **CAJ LONG**



Leopard-kato, unu el la raraj bestoj en primitiva arbaro



Sciencistoj desegnas geologian mapon.

Foto de **LU GÜOJÜAN**

Blua ĉeval-fazano, unu el la raraj birdoj en Tibeto


Foto de **CAJ LONG**



EL REALA VIVO DE ĈINIO


Sur la Leŭsa Altebenaĵo

Fotoj de ĜJI DACENG



Novaj kaverndomoj

*Popolaj metiartaĵoj
faritaj de kamparaj
virinoj*



Al parencoj

Adiaŭinte la akvoriĉan lokon sude de Jangzi-rivero, ni venis al la Leŭsa Altebenaĵo en nordokcidenta Ĉinio. La tiea pejzaĝo estas malsama ol tiu en la akvoriĉa loko, kie vidiĝas verdaĵo tutjare, brikaj loĝdomoj staras ĉe riveroj, sur kiuj navetas lignaj boatoj, sed sur la vasta Leŭsa Altebenaĵo oni rajdas sur azeno laŭ pado. Oni loĝas en kaverndomoj vintre varmaj kaj somere malvarmetaj. En frosta vintro oni provizas kaverndomojn per varmaj terlitoj. Nun oni jam anstataŭigis la terajn kaverndomojn per brikaj kaj vitris la fenestrojn kaj pordojn. La mastrinoj faris ruĝajn papertranĉaĵojn en formo de bestoj aŭ floroj por ornamo la pordojn kaj fenestrojn. Ili ankaŭ garnis la pordojn per tola kurteno kun desegnoj. Ĉio ĉi elspiras densan etoson de la Leŭsa Altebenaĵo.

La loko havas teron sterilan,

malabundas je pluvo kaj produktas diversajn grenojn. Lertaj virinoj per antikva muelilo muelas grenojn en farunon, el kiu ili faras paston kun kavo ĉe la mezo. Post vaporumado ili aldonas al

ĝi spicojn kaj tiel pretigas bongustan manĝaĵon. Dum nia intervjuo ni loĝis kune kun lokanoj en kaverndomo kaj ĝuis manĝaĵon kun loka gusto. Tie ni pasigis agrablajn tagojn.

Malantaŭ la domo




Ripozo sur kampo





Kaverndomo kun korto



Forgistoj


Muelado



Preparado de mangájo



Brodado



LA KVARA SESIO DE LA SESA TUTLANDA POPOLA KONGRESO DE ĈINIO OKAZIGITA

La Kvara Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso okazis en Pekino de la 25-a de marto ĝis la 12-a de aprilo.

La sesio sankciis, post serioza ekzameno, "La Raporton pri la Sepa Kvinjara Plano" faritan de ĉefministro Ĝaŭ Zijang en la nomo de la ŝtata konsilantaro, principe sankciis "La Sepan Kvinjaran Planon de la Ĉina Popola Respubliko pri la Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo" ellaboritan de ĝi, aprobis la Ĝeneralajn Principojn de Civila Kodo, Leĝon pri Deviga Edukado kaj Leĝon pri Entreprenejoj Funkciigataj per Alilanda Kapitalo, nomumis Ĉjaŭ Ŝi kiel vicĉefministron kaj Song Ĝjan kiel ŝtatan konsilianon kaj alektis Ĉu Tunan kiel vicprezidanton de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso. La sesio aprobis ankaŭ aliajn gravajn rezoluciojn.

La sesio daŭris 19 tagojn kaj sukcese plenumis la difinitajn taskojn.



La kongresejo

LA PLEJ GRANDA KLUZPORDO EN AZIO

Du kluzklapoj de kluzĉambro, lastatempe fabrikitajn de la Ĝeng-ĝoŭ-a Hidraŭlik-meĥanika Manufakturo, pezaj je 1 200 tunoj estos instalitaj sur la ĉefa naviga vojo de la unua-rivera konstruaĵo alta je 103 metroj de Geĝoŭba, Jangzi-rivero, por bari la riverfluan kaj faciligi la navigadon.

La totala areo de la kluzpordo estas pli ol 1 300 kvadrataj metroj, egala al tiu de kvar korbopilka ludkampoj. Ĝi estas la kluzĉambra kluzpordo plej granda en Azio. Por

bari la torentajn fluojn de la ĉefvojo de Jangzi-rivero la kluzĉambro devas elteni grandegan akvan premon.

"GRANDA HAN-LINGVA VORTARO" KOMPILITA

Estas kompilita la senprecedenca "Granda Han-lingva Vortaro" de Ĉinio post 10-jara penado de pli ol 400 fakuloj kaj instruistoj de la provincoj Siĉŭan kaj Hubej. Ĝi estos eldonata kaj distribuata ekde oktobro de la kuranta jaro. Ĝi konsistas el ok volumoj kun pli ol 56 000 eksplikitaj ideografiaĵoj. Laŭ plano ĝia lasta volumo eldoniĝos en 1989.

Ĝi entenas plej multe da normale skribitaj han-lingvaj ideografiaĵoj antikvaj kaj nuntempaj. Oni povos trovi en ĝi preskaŭ ĉiujn ideografiaĵojn uzatajn en la antikvaj kaj nuntempaj dokumentoj, libroj kaj materialoj. La vortaro havas ĉ. 20 milionojn da han-lingvaj ideografiaĵoj.

ĈINAJ SPORTISTINOJ ROMPI LA MONDAN REKORDON DE MARŜO

En marto ĉi-jare tri ĉinaj sportistinoj samtempe rompis la mondan rekordon de la viri-



Ĉina sportistino Ŝju Jongĝiŭ (antaŭe) en la konkurso pri marŝo

na 10-kilometra marŝo en la 5-a Ljaŭning-a Sportkunveno kaj en la konkurso pri la ĉina printempa marŝo okazintaj en Fuŝin.

Ŝju Jongĝiŭ rompis la mondan rekordon de 45'31"9 starigitan de ŝi per 44'59"2. Ankaŭ Ŭang Jan kaj Cuj Jingzi rompis la rekordon per 44'59"3 kaj 45'23"7 respektive.

12 ĈINOJ FARIĜIS MEMBROJ DE LA INTERNACIA ASTRO-NAŬTIKA AKADEMIO

12 ĉinaj astronaŭtikaj fakuloj unuafoje rekomenditaj de Ĉinio estis elektitaj kiel membroj de la Internacia Astronaŭtika Akademio en la kunveno memore al la 25-a datreveno de ĝia fondiĝo okazigita en 1985 kaj ricevis akademian ateston kaj insignon. Ili estas Ĵen Ŝinmin, Ĉen Fangjun, Ŭang Daheng, Lju Baŭŝej, Caŭ Hesun, Caj Ĝintaŭ, Ljang Ŝoŭpan, Jang Nanseng, Sun Ĝjadong, Jang Ĝjaĉi, Lu Ĵuanĝiŭ kaj Ĝŭang Fenggan. La akademio, fondita en 1960, estas aŭtoritata internacia astronaŭtika societo. Ĝi praktikas akademian sistemon. Ĝiaj 699 honoraj akademianoj, akademianoj kaj korespondaj akademianoj ĉiuj estas elektitaj. Nur fakuloj farintaj elstaran kontribuon al astronaŭtiko rajtas esti elektitaj.

JEN MEJ'E HONORITA PER BRITA MEDALO

Lastatempe la Brita Reĝa Societo de Geografio decidis doni Viktorian Medalon al Ĵen Mej'e, fama ĉina geografo kaj oceanologo, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj profesoro de la geografia fakultato de la Nankina Universitato. Li laboris super geografia esplorado dum la pasintaj pli ol 50 jaroj kaj publikigis pli ol 200 disertaciojn kaj fakajn verkojn pri la mara kaj karsta topografio.

La Brita Reĝa Societo de Geografio, kun la brita reĝino kiel sia honora prezidanto, estas la plej malnova kaj plej fama geografia organizo en la mondo.

LA UNUA ĈINA BUDHISMA FILHARMONIA SOCIETO FONDITA EN PEKINO

Lastatempe fondiĝis la unua budhisma filharmonia societo de Ĉinio — la Pekina Budhisma Filharmonia Societo, en la templo Ĝŭanghŭa en la norda parto de Pekino.

La societo fondita de la Pekina Budhisma Asocio celas prifosi kaj reordigi budhisman muzikon de Ĉinio kun mil-jara historio kaj disvolvi la ĉinan kulturon.

La societo havas 30 membrojn, inter kiuj estas 17 bonzoj kaj 13 instruistoj de la Centra Konservatorio kaj membroj de la Centra Nacieca Ensemblo. Bonzo Ĝengĝo, vicprezidanto de la Ĉina Budhisma Asocio, kaj komponisto U Zuĉjang, rektoro de la Centra Konservatorio, funkcias kiel ĝiaj konsilantoj.

EKSPOZICIO DE LA JUGOSLAVA NAIVA ARTO EN ĈINIO

La nomita ekspozicio okazis

marte kaj aprile en Pekino kaj Ŝanhajo.

La naiva arto de Jugoslavio estas arta skolo kun historio de 50 jaroj. Ĝiaj artistoj estas ordinaraj laboruloj kun arta genio, sed sen faka trejnado. Ili sekvas neniun eŭropan artan skolon kaj prezentas la realan mondon laŭplaĉe.

La ekspozicio eksponis 82 pentraĵojn de 11 artistoj. Ili estis liveritaj de la Zagreba Arta Muzeo, kiu starigis galerion de la naiva arto plej frue en la mondo.

MALLONGFIBRA POLIESTERA FABRIKO FINKONSTRUITA EN ĈINIO

Kunlabore kun koncernaj organizoj, la Ĝenerala Tekstil-maŝina Kompanio de Ĉinio provfabrikis kompletan ekipaĵon kun monda nivelo por produkti poliesterajn fibrojn, surbaze de necesaj importitaj softvaroj kaj specimenaĵoj. La 1-an de aprilo oficiale ekfunkciis la ok produkt-linioj de tiu ĉi kompleto da ekipaĵoj en la unua filia fabriko de la Jiĝeng-a Unuiĝinta Kemifibra Kompanio, Ĝjangsu-provinco.

La funkciado montris, ke la produktitaĵoj de la ekipaĵoj estas centpocente unuaklasaj.

En la Ekspozicio de la Jugoslava Naiva Arto



Dankinda helpo

de ĜJE FANG



Mi laboras en la urbo Langôŭ. Lastatempe mi oficvojaĝis al Pekino. Post kiam mi plenumis la taskon, mi aĉetis fervojan bileton por reveno. La trajno estis ekveturonta je la sepa kaj dudek sep minutoj. Matene, mi atendis en la hotelo amikon akompanontan min al la stacidomo. Jam estis dudek minutoj antaŭ la sepa, tamen mia amiko ankoraŭ ne venis. Mi ne povis atendi plu kaj telefonis por lui taksion, sed ne estis libera taksio en la proksimaj taksistacioj. Kion fari? Mi ne povis veturi alitage, ĉar jam estis tro malfrue por ŝanĝi la bileton. Kaj krome, mi jam telegrafis la ekveturon al la familio.

Mi iris al strato por prove hal-

tigi taksion. Kiel feliĉe! Rimarkinte mian mansvingon, iu ŝoforo haltigis sian aŭton. Kiam li sciigis, ke mi deziregas laŭeble rapide atingi la stacidomon, li nenion diris kaj metis miajn pakaĵojn en ĝin, kaj ni rapidis al la stacidomo.

“Kiel vi envagoniĝos kun tiom da pakaĵoj?” la ŝoforo rigardante antaŭen, demandis maltrankvile.

“Kiel mi envagoniĝos kun kvar grandaj pakaĵoj? Ĉu en la Pekina Stacidomo troviĝas pakajotransportistoj?” demandis mi.

“Eble la tempo ne permesas tion fari.”

“Kiel do. . .”

“Mi helpu vin enporti la pakaĵojn.”

Mi ja esperis tion, sed mi ne kuraĝis tion eldiri. Mi ankoraŭ ne diris “dankon”, kiam la taksio jam atingis la stacidomon. La ŝoforo haltigis ĝin kaj tuj helpis min porti la pakaĵojn. Li bone aranĝis ĉion antaŭ dek naŭ minutoj post la sepa. “Bonvolu diri al mi vian nomon. Se ne, mi ne forveturos!” petis mi sincere kaj firme, tirante lin je maniko.

“Mi nomiĝas Ĝu Ĝuoĉjang,” diris li vole nevole, viŝante ŝviton de sur sia vizaĝo kaj rapide iris for.

Mi elprenis la kvitancon kaj vidis sur ĝi la vortojn: “Taksio de Ĝuanghŭa-hotelo”.

Solvoj por “Cerbumu”:


1. Karambola aŭteto
2. Stari sur tabureto. Ĉar homo staranta sur Ĉomolangma fakte ne foriĝis de la tersurfaco.
3. Estas pli dolĉa la granda

bombono, ĉar dolĉeco de bombono dependas de la kontaktareo de la lango.

Solvoj por “Enigmoj”:

1. silkraŭpo
2. pavo

Solvo por “Aranĝu ŝakpecojn”:



Teatro kun eminentaj artistoj

Iu teatroamanto skribis al redakcio de ĵurnalo: "La pekinoj estas privilegiitaj, ke ili povas viziti la Popolan Artan Teatron de Pekino. Ĉie oni povas rigardi filmon, televidon kaj vidaĵregistraĵojn, dum la teatro estas unika."

La Popola Arta Teatro de Pekino kun historio de 34 jaroj estas arta halo de teatro, kie kolektiĝas eminentaj dramistoj kaj aktoroj. La direktoro Caŭ Ju estas tre elstara dramisto, kaj la forpasinta unua vicedirektoro kaj la ĝenerala

reĝisoro Ĝjaŭ Ĝjuĵin estis erudicia dramisto kompetenta kaj pri la ĉina kaj pri la fremdlanda teatra arto. Cetere, la dua ĝenerala reĝisoro de la teatro Oŭĵang Ŝanzun, la teatra edukisto Ĝaŭ Ĉĵijang kaj la famaj reĝisoroj Ŝja Ĝun kaj Mej Ĉjan, ĉiuj montris sian talenton en la arta kreado de la teatro.

La popola teatro disponas eminentan aktoraron, ekz. forpasinta Ŝu Ŝiŭen, Je Zi, Djaŭ Gŭangtan, Tjan Ĉong, Ĝu Lin, Ju Ŝiĝi, Tong Ĉaŭ, Ĝaŭ Junĵu. Fang Gŭande, Hu Zongŭen,

Ĝeng Ĵong, Lan Tjanĵe, Su Min kaj Jing Ĵŭoĉeng ĉiuj estas vaste konataj artistoj, kiuj kreis sur la scenejo malfacile forgesblajn artajn figurojn.

En la pasintaj 30 jaroj la Popola Arta Teatro prezentis ĉ. 200 dramojn, inter kiuj la dramoj de la tri elstaraj dramistoj Gŭo Moĵŭo, Laŭ Ŝe kaj Caŭ Ju havis gravan lokon. "Bronza Tigro", "Caj Ŭengĝji" kaj "U Zetjan" de Gŭo Moĵŭo, "La Kanalo Longŝjugoŭ", "Tetrinkejo" kaj "Kominzino" de Laŭ Ŝe, "Fulmotondro", "Sunleviĝo" kaj "Pekinanoj" de



Verkisto Laŭ Ŝe (la dua de dekstre) kaj la ĝenerala reĝisoro Ĝjaŭ Ĝjuĵin (la unua de dekstre) klarigas "Tetrinkejon" al aktoroj.

Caŭ Ju konsistigas la plej rafinitan parton de la repertuaro de la popola teatro.

La distingiĝa stilo de la grandaj dramistoj kaj la lerta reĝisorado de la reĝisoroj ebligis al la teatro formi perfektan distingiĝan "artan sistemon".

Aparte menciinda estas la forpasinta ĝenerala reĝisoro Ĝjaŭ Ĝjujin. Diplomite de la franca Pariza Universitato kiel literatura doktoro, li dediĉis grandan energion al la provado kaj praktikado de naciigo de teatro de Ĉinio. Lia principo "krei okulfrapajn scenejajn figurojn pere de profunda interna perceptado kaj surbaze de la vasta aktuala vivo" plene enkorpiĝis en la dramo "Tetrinkejo" kiun li reĝisoris.

"Tetrinkejo" estis verko de Laŭ Ŝe kaj finita en 1957. La dramo prenis kiel fonon la tempon de la fino de la 19-a jc. ĝis la mezo de la 20-a jc. Pere de la ŝanĝiĝo de iu granda tetrinkejo en Pekino kaj la travivaĵoj de la kutimaj klientoj, la dramo malkovris la veran fizionomion de la

malnova Ĉinio. Kvazaŭ ĉina tradicia ĝenro, la dramo modeste kaj nature prezentis la trajtojn de la historia epoko kaj ankaŭ karakterizajn personojn.

La sukcesa surscenigo de "Tetrinkejo" estas kristaliĝo de longtempa harmonia kunlaborado de Ĝjaŭ Ĝjujin kaj la artistoj de la teatro. La muldado de la figuroj, la sceneja direktorado, la modera ritmo k.a. en la dramo "Tetrinkejo" senspure sorbis la avantaĝojn de la ĉina tradicia teatra arto kaj sukcese kreis ĉinan teatron kun forta nacia gusto kaj epoka atmosfero.

La prezentado de "Tetrinkejo" rikoltis sensacian sukceson. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la Popola Arta Teatro prezentis ĝin pli ol 300 fojojn ĉiam kun varma aplaŭdo. Iu teatroamanto rigardis la dramon 27 fojojn.

En 1980 kaj 1983, la Popola Arta Teatro prezentis "Tetrinkejon" en FR Germanio, Francio, Svisio kaj Japanio. Okcidenta ĵurnalismo raportis, ke "Tetrinkejo" estas mondnivela en pre-

zentado kaj "miraklo de la teatra arto de la Oriento". La ĉina teatra arto kun naciaj karakterizaĵoj enviciĝis inter la internaciaj teatraj artoj.

En la repertuaro de la Popola Arta Teatro fremdlandaj dramoj okupas certagradan lokon, ekzemple "Rimedo pro Rimedo" de Ŝekspiro, la ĉefdramo "La vizito de Olda Damo" de fama svisa dramisto F. Durrement, "La Morto de Vendisto" de fama verkisto Arthur Miller, "Kartludo" de fama usona dramisto D. L. Coburn kaj la eminenta verko de brita verkisto Peter Shaffer "Amadeus". Surscenigo de tiuj dramoj montris eminentan kapablon de la Popola Arta Teatro en prezentado de fremdlandaj teatroj.

Ni prenu "Kartludon" kiel ekzemplon. La teatro prezentis du maljunulojn interkonatiĝintajn en iu azilo de Usono. Pro la diferencoj en karaktero kaj psiko, inter la maljunuloj eksplodis serio da dramaj konfliktoj. Sur la ĉina scenejo, la teatro konservis ankoraŭ usonan ŝercemon kaj ĉinan humurecon, kio instigis la rigardantojn al remaĉado pri la teatro.

"Kartludo" havas nur du rolojn, kio postulas de la roluloj majstran arton de aktorado. Ju Ŝiĝi, kiu rolas kiel maljunulo Weller, rolas kiel la mastro Ŭang en "Tetrinkejo". En la pasintaj pli ol 20 jaroj, li ludis la rolon kaj sur scenejo kaj en filmo, kaj turneis en Eŭropo kaj Japanio, tie li profunde impresis la rigardantojn. Weller, kiun li ludis, estas reala, neniom afekta kaj ankaŭ drama, ke multaj pozoj kaj paroltonoj estis longe poluritaj. Dum la tuta dramo li disdonis kartojn 14 fojojn, kaj laŭ la evoluo de la intrigo kaj ŝanĝiĝo

Sceno el "Tetrinkejo"





Sceno el "Kartludo"

Sceno el "La Morto de Vendisto"

de la humoro de la roloj, neniu pozo nek movo estis ripetitaj.

Ĝu Lin, la rolulo de Fancia, iam ludis poedinon Caj Ŭengĵi en la lastaj jaroj de la Orienta Handinastio (25-220) kaj imperiestrinon U Zetĵan (690-705 sur la trono) de Tang-dinastio (618-907). Ludante Fancia, ŝi trafis kaptis la psikon kaj karakteron de la rolo kaj montris per komedia formo al la rigardantoj amaron spertitan de Fancia.

La prezentado de la du eminentaj aktoroj gajnis grandajn sukcesojn, kio plene montris la eksterordinaran provon de la Popola Arta Teatro en arto de prezentado.

En la pasintaj jaroj la Popola Arta Teatro faris novajn provojn kaj en verkado kaj en prezentado, kio vekis vastan atenton. Juna dramisto Gaŭ Singĝĵan kaj juna reĝisoro Lin Ĝaŭhŭa kunlaboris en adapto kaj reĝisorado de "Absoluta Signalo", "Stacio", "Sovaĝa Homo" k.a., kio vekis varman eĥon en la socio.

"Sovaĝa Homo" estas moderna epopeo kun multaj temoj kaj multaj tavoloj strukture simila al simfonio. En la teatro la dramisto elvolvis kvar paralelajn fadeojn: Serĉado de kaj rezonado pri sovaĝa homo; protekto de arbaro por konservi la ekologian ekvilibron; neklera kulturo esprimita per maljuna ŝamano; la vivo, sento kaj geedzeco de modernuloj. Krome en la teatro speguliĝis ankaŭ sekundaraj temoj pri la virina sorto kaj homaj interrilatoj.

Pere de la esprimriĉaj movoj de la aktoroj kaj la scenejaj lumoj, reĝisoro Lin Ĝaŭhŭa kreis sur la scenejo diluvon, trosekon, mondokreadon kaj aliajn imponajn vidaĵojn. En reĝisorado li aplikis ankaŭ modernajn teatrajn konceptojn en dispozicio pri ĝeneraj scenoj karakterizitaj per fortaj lokaj koloroj.

Sendube, "Sovaĝa Homo" ne estas perfekta. Tamen la provado en verkado kaj prezentado de la dramo malfermis novan kam-

pon por la ĉina teatra arto, kio havas gravan signifon.

La progreso de la Popola Arta Teatro en la pasintaj 30 jaroj intime rilatis kun la spektantoj fervoraj al la teatro. S-ro Ĝjaŭ Ĝjuĵin elmetis la principon "verki kune kun la rigardantoj". En la pasintaj 30 jaroj, post ĉiu premiero la Popola Arta Teatro ricevis multajn leterojn de rigardantoj. Sekve la teatro starigis specialan fakon por esplori la estetikan inklinon de la rigardantoj, kaj kelkiam invitis rigardantojn al la teatro por kunsido. Kelkfoje la reĝisoroj kaj aktoroj intervidiĝis kaj varme interparolis kun rigardantoj en la salonoj post prezentado. Cetere la teatro turneis tra la lando, en fabrikoj, minejoj, vilaĝoj kaj kazernoj.

Se la Popola Arta Teatro estas la halo de arto de teatro, la multnombraj rigardantoj estas do la bazo de la halo, kaj ĉiu elkora laŭdo de la rigardantoj plimponigas la halon.

第二十五课 Dudekkvina Leciono

游览北京 Viziti Pekinon

Ofte uzataj vortoj

我逗留三天

日程怎样安排

地下宫殿是怎么回事

我一定要去看看

我建议您去故宫

wǒ dòuliú sān tiān

richéng zěnyàng ānpái

dìxià gōngdiàn shì zěnmehuìshì

wǒ yīdìng yào qù kànkàn

wǒ jiànyì nín qù Gùgōng

mi restos tri tagojn

kiel aranĝi tagordon

kio estas subtera palaco

mi nepre iros ĝin viziti

mi proponas al vi viziti la

Imperiestran Palacon

tre interese

太有意思了

tài yǒu yìsi le

Dialogo

A: 先生, 我打算在北京呆三天, 您看日程应该怎样安排?

A: Xiānshēng, wǒ dāsuan zài Běijīng dāi sān tiān, nín kàn richéng yīnggāi zěnyàng ānpái?

sinjor-, mi intenc- en Pekin- rest- tri tag-, vi rigard- tagord- dev- kiel aranĝ-

A: Mi intencas resti tri tagojn en Pekino, kiel vi opinias pri la aranĝo de la tagordo, sinjoro?

B: 这样吧, 第一天您先游览长城和十三陵地下宫殿。

B: Zhèyàng ba, dìyī tiān nín xiān yóulǎn Chángchéng hé Shísānlíng dìxià gōngdiàn. tiel, unua tag- vi unue vizit- long- mur- kaj dek tri maŭzole- subter- palac-

B: Tiel, en la unua tago vizitu la Grandan Muron kaj la subteran palacon ĉe la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio.

A: 地下宫殿是怎么回事?

A: Dixià gōngdiàn shì zěnmehuìshì? subter- palac- est- kia afer-

A: Kio estas la subtera palaco?

B: 地下宫殿是一个皇帝的陵墓, 那里有许多出土文物。

B: Dixià gōngdiàn shì yīgè huángdì de língmù, nàli yǒu xǔduō chūtū wénwù.

subter- palac- est- unu imperiestr- maŭzole-, tie est- mult- elter- histori- objekt-

B: La subtera palaco estas tombo de imperiestro, tie estas multaj elterigitaj historiaj objektoj.

A: 这么说, 我一定要去看看。

A: Zhème shuō, wǒ yīdìng yào qù kànkàn. tiel dir-, mi nepr- dev- ir- rigard-

A: Do, mi nepre iros ĝin viziti.

B: 我建议您第二天去参观故宫。

B: Wǒ jiànyì nín dìèr tiān qù cānguān Gùgōng. mi propon- vi dua tag- ir- vizit- imperiestr- palac-

B: Mi proponas al vi viziti la Imperiestran Palacon en la dua tago.

A: 听说那是皇帝住过的地方, 对吗?

A: Tīngshuō nàshì huángdì zhùguò de dìfang, duì ma?

laŭdir- tie est- imperiestr- loĝ- lok-, ĉu

A: Laŭdire, tie estis loĝejo de imperiestroj, ĉu?

B: 是的。从故宫后门出来, 您可以去北海公

园的仿膳饭庄尝尝宫廷风味的饭菜。

B: **Shìde. Cóng Gùgōng hòumén chūlái, nín kěyǐ qù Běihǎi Gōngyuán de Fǎngshàn Fànzhuāng chángchang gōngtíng fēngwèi de fàncài.**

jes. el imperiestr- palac- post- pord- elir-, vi pov- ir- Bejhaj park- Fangšan restoraci- gustum- korteg- gust- plad-

B: Jes. Elirinte el la norda pordo de la Imperiestra Palaco, vi povas iri ĝui kortegajn pladojn en la restoracio Fangšan en Bejhaj-parko.

A: 那太有意思了。

A: **Nà tài yǒu yìsi le.**

tio tre hav- interes-

A: Tio estas tre interesa.

B: 第三天,您可以去颐和园。那里原来是皇帝的夏宫,有山有水,风景优美。

B: **Dìsān tiān, nín kěyǐ qù Yíhéyuán. Nàli yuánlái shì huángdì de xiàgōng, yǒu shān yǒu shuǐ, fēngjǐng yōuměi.**

tria tag-, vi pov- ir- somer- palac-. tie

origin- est- imperiestr- somer- palac-, hav- mont- hav- akv-, pejzaĝ- bel-

B: Vi povas iri la trian tagon al la Somera Palaco kun monto kaj lago, kies pejzaĝo estas tre bela. Origine la palaco estis por imperiestro.

A: 除了这些地方,北京还有哪些名胜古迹?

A: **Chúle zhèxiē dìfang, Běijīng hái yǒu nǎxiē míngshèng gǔjǐ?**

krom- tiuj lok- Pekin- ankaŭ hav- kiuj fam- lok- kaj histori- restaĵ-

A: Ĉu estas ankaŭ aliaj famaj vidindaj lokoj kaj historiaj restaĵoj en Pekino krom ili?

B: 还有香山、天坛、雍和宫等,好玩的地方可多了。

B: **Hái yǒu Xiāngshān, Tiāntán, Yōnghégōng děng, hǎowán de dìfang kě duō le.**

ankaŭ est- Ŝjangšan, Tjantan, Jonghegong ktp. interes- lok- tre mult-

B: Estas ankaŭ Ŝjangšan-parko, Tjantan-parko, Jonghegong-templo ktp., tre multaj interesaj lokoj.

Klarigoj:

1. 这样吧 estas uzata en la komenco de frazo por elvoki proponon, elekton kaj decidon faritajn post pripensado, kun milda tono.

2. Oni uzas 怎么回事 por demando, kiam oni ne konas ion aŭ ĝian kialon.

3. 这么说 montras logikan sekvon aŭ konkludon el la antaŭa frazo.

4. 您可以去仿膳饭庄: 可以 montras ion farindan aŭ proponindan.

5. 好玩的地方可多了: 可...了 havas nuancon de admiro.

INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ (IAHE)

eldonas specialigitan revuon:

VOĈO DE HANDIKAPULOJ

La celo de tiu ĉi revuo estas aŭdigi voĉon kun fizikaj malavantaĝoj, ne por plendi, sed por esprimi kreivecon, optimismon, amon kaj homan fratecon kaj humanecon.

Redaktas: S-ro Dušan Adnadj

Jarabono: 5.-US dol. aŭ egalvaloro en nacia valuto, pagebla al nia konto ĉe UEA sub kodo: Voch-o aŭ per internacia poŝtmandato al nia adreso: "Voĉo de Handikapuloj" 56227-Borovo, Školska ul. 25, Jugoslavio.

CERBUMU

Doni ĝustan respondon al jenaj problemoj estas ne facile. Vi devas vigligi vian penson kaj bone cerbumi. Nu provu.

1. Kia veturilo rajtas ne observi la veturkodon kaj senbride karamboli kun aliaj?

2. Homo staranta sur Ĉomolangma fanfaronas, ke li estas la plej malproksima for de la tersurfaco. Sed mi havas rimedon por esti pli malproksima for de la tersurfaco ol li. Ĉu vi scias, kie mi staras?

3. Estas du bombonoj el sama materialo, unu granda kaj la alia malgranda. Kiu el ili estas pli dolĉa aŭ ĉu ili estas egale dolĉaj? (solvoj troveblaj en ĉi numero)

ARANGŬ ŜAKPECOJN (Inteligenteca konkurso)

Sur la bildo estas naŭ kvadratoj, ĉiu el kiuj havas po du ŝakpecojn escepte de la centra, kaj


tiel viciĝas po ses ŝakpecoj ĉiuflanke.

Bonvolu almeti unu ŝakpecon kaj aranĝu ilin denove, por ke sur ĉiu flanko ankoraŭ estu ses ŝakpecoj.

(solvo trovebla en ĉi numero)

LIBROJ JA ESTAS PRESITAJ (Humuraĵo)

Iu knabo ne ŝatas legi. Lia patro eksplodis de kolero kaj lin fermis en legoĉambron, ordonan-



te: "Atente legu per la okuloj kaj bone meditu per la cerbo, vi do komprenos ion el la libro."

Tri tagojn poste la patro eniris en la legoĉambron por kontroli



la legadon de la filo. "Paĉjo, vi diris prave. Post tritagaj legado kaj meditado mi fine komprenis, ke presitaj ja estas la libroj!" ĝoje diris la filo.

ENIGMOJ

1. Nigra kaj flava en l' infaneco, ĝi blankiĝas kaj dikiĝas post maturo. Okupante pri ŝpinado tagnokte, ĝi fine elteksis silkan reton.

(insekto, solvo trovebla en ĉi numero)

2. Ĝi portas surkape kronon kaj survoste koloran ventumilon, je kies malfermiĝo, aplaŭdas ĉiuj apudstarantoj.

(solvo en besta kadro trovebla en ĉi numero)

Bronza blovinstrumento en formo de kalabaso

Foto de **ZOŬ JONGĈJONG**

La nomita blovinstrumento, konata kiel valora objekto de la antikva Djan-regno, estis farita en la 3-a — 1-a jc. a.K. Kun alteco de 28.2 cm. ĝi havas sur la supra parto de la kurba tubo versimilan bovon kun fortaj muskoloj kaj sur la malsupra parto de la tubo truetojn kun postsigno de putriĝinta bambuo ene. Por ludo oni devis enmeti bambuajn tubetojn

povantajn produkti malsamajn sonojn. La muzikilo estis elterigita en Junnan-provinco, Ĉinio. Inter la naciminoritatoj en Junnan kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo ankoraŭ konserviĝas jena moro: En ĉiu festotago oni ludas tian muzikilon por amuzo. Junuloj de iuj naciecoj ludas ĝin por esprimi sian amon al knabinoj:



*Bronza blovinstrumento
en forma de kalabaso*

